



## DUMONATA KULTURA INFORMILO KAJ ESPRIMILO

Redaktejo : Esperanto, F 47470 BEAUVILLE

Unu n-ro : 10 FF. Unujara abono : 60 FF ĝirotaj al

**CERCLE AMICAL ESPERANTISTE pĉk 3371 74 M Bordeaux**  
(mencii same sur bankĉekoj!) Nia tel.: 53 95 40 26

## PROVO DE KLASIFIKO


Rilate al esperanto estas distingeblaj ses diversaj kategorioj de homoj :

1. La nepraj malamikoj de la ideo mem de lingvo internacia. Feliĉe tiuj lingvaj ŝovinistoj pli kaj pli malmultiĝas.

2. La kontraŭuloj al la zamenhofsolvado de L.I. Inter tiuj ĉi mi kalkulas ne nur la lastajn idistojn, okcidentalistojn ktp, sed ankaŭ ĉiujn reformistojn, kiuj pretendas plibonigi kaj "modernigi" la Fundamenton. Feliĉe ili ne estas tre danĝeraj.

3. La indiferentaj, kiuj nek helpas nek kontraŭbatalas la movadon : inerta amaso, kiu laŭokaze povas sekvi iun belparolanton por aŭ kontraŭ ion ajn. Ni ne fidu al ili.

4. La simpatiantoj. Tiuj, kiuj diras: "Esperanto estas bonega ideo. Oni devus instrui ĝin en ĉiuj



lernejoj." Sed ili neniam provos mem lerni ĝin. Kelkaj el ili estas tamen varbeblaj, sed kiom da penoj restos senfruktaj!

5. Tiuj, kiujn Lanti nomis "esperantanoj". Ili aliĝas al niaj asocioj, kotizas, volonte propagandas, sed restas ĉiamaj komencantoj. Tiuj elokventaj krokodiloj nemulte antaŭenigas la aferon.

6. Fine la veraj esperantistoj : tiuj, kiuj akceptas la penon ellerni la lingvon, praktiki ĝin per legado, skribado kaj parolado, kaj klopodas por apliki ĝin al aliaj celoj ol nura varbado : ne nur al por- sed ankaŭ al peresperanta laboro. Dum longa tempo tiuj ĉi estis eta malplimulto. Nun mi konstatas, ke ili pli kaj pli multiĝas. Tial mi estas optimista.

VALO.

\*\*\*\*\*

## VIVO DE "LAŬTE!"

### BONVENON AL LA NOVAJ LEGANTOJ !

Tiun ĉi numeron ni sendas prove al kelkaj dekoj da novaj adresoj, ĉefe al freŝdate aliĝintaj SAT-anoj. Ilin ni petas ekzameni la gazetspecimenon, kiun ili nun tenas en manoj, kaj decidi ĉu **Laŭte!** valoras atenton, legadon aŭ ...flankenmeton.

\* Al la bonvenaj interesatoj, kiuj deziras aboni ekde la nuna jaro, ni povos sendi la 3 numerojn aperintajn jam de januaro.

\* Kiuj deziras aboni samtempe ankaŭ por 1992, tiuj sciu, ke la kosto de la abono restos senŝanĝa venontjare; do per 120 FF, ili ricevos la dujaran kolekton.

\* Fine, ni atentigas tiujn, kiuj interesiĝas ankaŭ pri la eldonaĵoj de SAT-Broŝurservo, ke ili povos ricevi broŝurojn kun 20-procenta rabato, fariĝante, per 200-franka ĝiro, monprovizantoj A aŭ B (vd. p. X de la SAT-Adresaro!)

Antaŭdanke al ĉiuj, C.Baudé

### La adresaro de Laŭte!

Pro abundo de aperigendaj artikoloj la renovigita adresaro de **Laŭte!** ne povos aperi antaŭ septembro. Ni petas ĉies indulgon.



Nia debato per ĉenletero

KIA SOCIALISMO ?

KIA KLASBATALO ?

Garolo -

Nia homa mondo, konstateble, rapidege evoluas. Ĝi malevoluas, tio estas ke la vivkondiĉoj de la homoj malboniĝas, (por la plimulto), kaj oni ekkonscias pri baldaŭa findetruo, se ne de nia planedo, almenaŭ de la surteraj viveblecoj. Ĉu temas pri pesimisma diro? Bedaŭrinde ne, la krizoj ekzistas en ĉiuj kampoj, dum la homoj fremdaj en sia propra medio restas senpovaj pro nekonscio kaj manko de agovolo.

Kiu analfabeto (pli ol 50% el la homaro estas tia!) kapablas konscii pri nia komplika vivo de l' komputilerao?... Kaj post 10 jaroj estos 6 000 milionoj da tiaj analfabetoj aŭ duonanalfabetaj homoj, kiuj malsate finvoros la verdajn arbarojn... jen la dramo preter la petrolaj eksplodoj en Arabioj.

En 1850, kiam estis nur iom pli ol 1 000 milionoj da homoj sur la tero, kelkaj pensuloj teoriumis pri "socialismo", kaj en la komenco de nia jarcento la homoj serioze pensis kaj eĉ praktike celis instali tiun socialismon... Oni revis pri "komunismo", sub diktaturo.. de l'proletaro. La iluzio, kiel kastelo el sablo, ĵus ruiniĝis, post la konataj subpremoj en gulagoj, post teruraj maljustaĵoj kontraŭ la individuoj ktp...

Paralele al la iluzia socialismo floris ĉiuspecaj ŝtatismoj kaj imperiismoj dum la konkera koloniismo stompigis. Tamen postvivas la ekonomikolonia imperiismo de kelkaj



nacioj. Sendube la plej fama el ili estas Usono, kiu kun 6% el la tera loĝantaro, konsumas 35% el la tuta produktita energio. La evoluinta duoninsulo de Eŭropo, kie oni pene eldonas "Laŭte!" ankaŭ apartenas al tiu imperiisma skemo... spite al la tieaj "mizeroj".

Tiel, dum hordoj da homoj po milionoj morteme vivacas ĉar ili perdis sian naturan kapablon de sindefendo, malmultaj milionoj pliaj ĝuas en konsumismo kun infarktoj aŭ podagroj. Sed, pro la teknikaj evoluoj, en tiuj evoluintaj privilegiaj socioj aperas aliaj problemoj. Unue la homoj fuĝis de nia natura vivmedio, la kamparo, por sin instali en vertikalaj turoj en urbegoj, ĝuste pro la logo de "konsumismo" kun ties supraĵaj avantaĝoj. Due, la homa aktivado tute transformiĝis. Interese estas konstati, ke malpli ol 10% (5% en Usono) agadas por produkti la nutraĵojn de ĉiuj. Malpli ol 20%, en la industrioj, produktas la konsumismaĵojn aŭ la ekipaĵojn por ilin produkti. La kromo, t.e. pli ol 70% el la homoj, agadas (aŭ malagadas) en la t.n. servoj aŭ terciara sektoro, kiun malofte la homoj kuraĝas priskribi, ĉar kio estas ĝi? Nu, la 70% el la homoj, kiuj "dungigās" en la hontiga terciara sektoro, estas ja la "senlaboruloj", (jam pli ol 10% el la laborpovaj homoj) sed ankaŭ ĉiuj parazitaj imagoj en la burokratismo, en la ŝtataj kontroloj, en la defendado de ĉiuj patrioj. La senutilaj servoj estas la bankoj, la preĝejoj, ĉiuspecaj makleradoj ĝuste de servoj el konsumado, la reklamado ks. La parazitaj estas la batalionoj da policistoj, da leĝofarantoj kaj leĝo-defendantoj, kaj multaj, multegaj "profesoroj", kiuj agadas por kondiĉigi nin al tia sociordo, al tiu monkapitalismo, kiujn la homoj nepre bezonas kun monopoloj, oligarkioj, konzernoj ks.

Ĉar, jes, tio estas alia problemoj, fronte al la socialismo, kiu "laboristo" per ioma ŝparo ne ĝuas la koncernan interezon? La spekulado estas universala karakterizo de la homo. Kaj kiu ne preferas pigri anstataŭ labori (jam aperis debato en Laŭte). Cetere tio estis unu el la kaŭzoj de la fiasko de komunismo, de socialismo. La homoj perdis sin en la mito: kolektiveco, (kiun mi persone daŭre denuncas) kaj atendas ke kolektiveca supera instanco, la monstra ŝtato, solvu ĉiujn problemojn de la individuo.

Laŭmode, nun la plej uzataj vortoj estas "sociala justo" por atingi socialismon. Kompreneble neniu prezentas klaran eksplikon pri tiu "sociala justo" pro la simpla fakto, ke temas pri iluzio, neeblaĵo. Sendube, la nura "sociala justo" ebla, estus tiu spaco en la socio, kie ĉiu kaj ĉiuj homoj havus la saman oportunon de agado por sia vivtenado. La "sociala justo" neniel povas enteni la ideon pri plena egaleco (feliĉe plena egaleco okazas ĉe neniu specio) pri simpla distribuado, disdonado de la produktoj, riĉaĵoj kaj havaĵoj. Plie, la "sociala justo" ne povas konduki al la konfuzo inter solidaro kaj almozo. Ni jam forgesis, en nia nuna evoluo de hipokrituloj, ke por ĝui niajn sociajn rajtojn de homoj ni devas plenumi niajn homajn devojn de individuoj.

Resume, jen la evoluo de la nocioj kaj de la faktoj de la komenco de nia jarcento ĝis nun. Mi starigas do la demandojn: kian sociordon (socialismon) ni povas konstrui, kaj per kia klasbatalo (la vorto amuze restas kroĉita en SAT) se la klasoj ne plu havas la saman formon kiel en 1920 en la distingo laboristoj-kapitalistoj?

Bonvolu pardoni al mi, se la temo estas tro amplekse komplika, kaj ne elĉerpebla, ĝi tamen estas aktuala kaj traktenda, por ke ni prenu homkonforman gvidlinion de idealistaj agantoj je la danĝera krucvojo, kie nia mondo troviĝas. Nia postvivado kaj tiu de niaj idoj dependos nur de niaj homkonformaj sintenoj kaj agadoj.

*Suzanne :*

*Garolo klarvide skizis la homan mondon kaj la fin-detruon de la surteraj viveblecoj. Tia priskribo ne estas pesimisma diro, ho ve!*

*Koncerne "komunismo": senpripensaj homoj atribuas tiun vorton al ŝtatoj, kiuj sin nomas "socialistaj". Ĝis nun nenia ŝtato praktikis komunismon. Nomi la regadon de tiaj "socialistaj" landoj diktaturo... de l' proletaro estas stultaĵo, kaj, ĉefe, malveraĵo, pro la simpla fakto, ke la proletaro ne regis tiujn landojn...male, la proletaro estis (as) subpremata.*



En komunisma sociordo, same kiel en "distribua ekonomio", temas nur pri solidaro. Tiam per ĝi pliboniĝos la individuo. En tia sociordo regos la kolektivon ne la monstra ŝtato, sed ĉiuj, same kiel pri la disdonado de la produktaĵoj. Tiam la homoj, ne havante angoron (pri malsanoj, pri emeriteco...) povos plene disvolvi sian personecon (siajn kapablojn, talentojn ktp.) unuvorte, vivi. En tia sociordo, ne estas devige fariĝi por la plimulto mallaboremuloj... En la nuna sociordo estas mallaboremaj homoj.

Kvankam la "klasoj ne plu havas la saman formon kiel en 1920 en la distingo laboristoj-kapitalistoj (tio, ĉefe pro la terciara sektoro), ĉar tiuj ĉi ne konsideras sin "laboristoj", klasbatalo ne estas for el la aspiro de la homaro.

Ĉu ne estas motivo de klasbatalo por "sociala justo" kiam oni konstatas, ke nur 10% agadas por produkti la nutraĵojn de ĉiuj, kaj malpli ol 20% en la industrioj produktas la konsumismaĵojn aŭ la ekipaĵojn por ilin produkti? Tio estas : sen ilia laboro, la socio ne estus. Kiam oni konstatas, ke ili malmulte perlaboras per tio... ke ĉefe la 70% profitas de tiuj produktaĵoj, ĉar, foje, tiuj, kiuj produktas, ne havas sufiĉe da mono por havigi al si siajn produktaĵojn.

Al la multegaj "profesoroj", kiuj kondiĉigas nin, oni aldonu la "gangrenon" de la dudeka jarcento : la televizion, kiu instigas la homojn al la pasiveco, al la submetiĝo. Ĝi montras la eniron en la socion. De nun la individuo, kiu ne havas televidilon, estas konsiderata kiel nenormala, margena, suspekta.

#### Nicole Déjean :

Post sia nigra skizo de la mondorganizado Garolo faras demandojn pri eblaj socialismo kaj klasbatalo, sen iu ajn iluzio, sen espero pri "Solvo".

Jes, ne estas "Solvo", ne estas magia rimedo por ke la mondo tuj iĝu feliĉa, justa, grandanima, solidara.

Kiujn respondojn li vere atendas de ni? Ĉu li ĝuos pli-ajn senesperajn rimarkojn, kiuj plivigliĝos lian opinion pri senpoveco, senespero de la homaro?

Laŭ mi, nur parte li pravas, kiam li prezentas la mon-

don tiel plendinda, mizerplena, ĉu materie, ĉu morale, nur parte, ĉar estas ankaŭ alia aspekto de la mondo, pli pozitiva, pli esperplena. Se ne, li, ni, ne plu povos elteni vivon. Li, ni estus definitive neklerigeblaj, nesentemaj, malhumanaj.

Jam de longe homoj provas starigi pli justan socian sistemon. Mi ne kapablas disertii pri ĝi, mi eĉ ne emas tion fari, mi ne kapablas starigi novan socian sistemon (estus ege pretendeme!). Ŝajnas al mi, ke nuntempe ne taŭgas same kiel antaŭ 150, 100, aŭ 50 jaroj pritrakti la politikajn, sociajn problemojn. La nunaj ribeloj, konfliktoj, militoj estas instruplenaj pri la komplikeco de nia mondo. Vivo estas movo, ŝanĝiĝo, evoluo, ne ĉiam facile akcepteblaj. En nia propra vivo ni devas evolui, disvolvi kvalitojn kiel toleremo, solidareco, kuraĝemo, respekto, provi esti pli kaj pli kleraj, aktivaj, respondecaj en nia ĉiutaga vivo... kaj ami la Vivon... se ni vere deziras starigi mondon pli justan, paceman, solidaran.

Longa malsano igis min tre pacienca, tre modesta...kaj paradokse pli optimista, pli fidema al la Vivo. Jen mia konkludo.

#### J.G. :

Nia socio pli kaj pli kompleksiga. La malnovaj skemoj ŝajnas ne plu kongrui kun la nuna situacio. Ni estas en transira epoko. La teknologio fariĝas la nova povo kun rapida akcelo.

La problemoj estas : Kiu posedos tiun povon? Al kia celo? Kiajn kontraŭplanojn oni povas starigi?

#### Nur unu alternativo :

Aŭ centraligita sistemo kun teknikistoj posedantaj la scion, regantaj : ekonomion laŭ akra konkurenco, kun senlaboreco kaj ekskludo de ĉiuj kiuj ne povas integriĝi ; ankaŭ la mensojn per la manipulado de la informoj kaj eble la esencon mem de la homo per genetiko.

Aŭ, dank'al alia uzo de la teknikaj rimedoj, kreado de retoj de rekta informado (Minitelo, komputoroj bone uzataj povas ĝin permesi), al ĝeneraligita informado permesanta al ĉiuj, ne nur al la tenantoj de la povo de la scio, partopreni aktive la socian vivon kun planeda vizio de la problemoj, kreivo, aliaj kon-



ceptoj pri la laboro, la disdono de la produktataj varoj, la protektado de la medio ktp.

Kio jam povas helpi por ke la dua parto de la alternativo estu elektita anstataŭ la unua? Nur transformado de la mensoj per alia edukado, alia koncepto pri la konsumado, reago al la pasiveco vidalvide al la informiloj : televido, gazetaro ktp. Kelkaj asocioj jam komencas ludi tiun rolon : konsumantoj, spektantoj, ekologianoj ktp.

La marĝeno estas mallarĝa, sed laŭ mi nur tie estas iu espero por nia socio.

### **SOCIA JUSTO aŭ MALFERMITAJ LIMOJ?**

Kia socialismo? Kia klasbatalo?

**Ĵanseb :**

La temo ŝajnas al mi tiel vasta, kiel mia nescio. Mi povas alporti nur kelkajn pripensojn, kaj lasi la legonton konkludi mem.

La t.n. socialismo aŭ transformiĝis en diktaturojn (komunismo), aŭ asimiliĝis al kapitalismo (social-demokratio). Mankas ekzemploj de originala funkcia socialismo.

La t.n. klasbatalo estas la moderna formo de la diablo: Ĝi fontas el la naiva kredo, ke sufiĉas detrui la Malbonon, por ke ĉio fartu plej bone. Bedaŭrinde, detruo ne estigas fabrikojn nek rikoltojn nek pacon. Historio pruvis ke estas precize tiuj sistemoj, bazitaj sur tiaj kredoj, kiuj estis detruindaj, por ke la homaro pace plu vivu.

### **Malfacilas foresti de siaj tradicioj...**

La kapitalismo bone funkcias en la anglo-saksaj landoj (kie ĝi naskiĝis), proksimume bone en la eŭropaj latinidaj landoj, katastrofe en Afriko aŭ Latinameriko. En Japanio ĝi adaptiĝis al la loka tradicia sistemo. En Orienteŭropo, la unuaj provoj ne ŝajnas tre kontentigaj.

Malfacilas abrupte fortiri popolojn de iliaj tradicioj. Kiam tio okazas, estas kontraŭ la natura ekvilibro, kaj oni bezonas forton por kontraŭstari la emon je reveno al ekvilibra punkto : tiel aperas diktaturo. Ne mankas ekzemploj.

### **Fermitaj, aŭ malfermitaj homgrupoj?**

Solidareco eblas en fermitaj homaj grupoj, t.e. grupoj, kiuj enhavas la saman nombron da homoj. Ne eblas en

malfermitaj grupoj, ĉar oni devas dividi la saman riĉecon inter kreskanta nombro da personoj. Tial ekzistas sociaj klasoj, kiuj estas fermitaj grupoj de solidaraj homoj, kadre de malfermita socio. Konsekvence, kiam oni malfermos la landlimojn, novaj sociaj klasoj aperos. Tiu fenomeno bedaŭrinde jam aperis en okcidentaj landoj kun la t.n. "kvara mondo".

Tio estas grave priatentinda, ĉar socia justeco estas nekongruigebla kun malfermo de la limoj, almenaŭ samtempe. Tiun eraron oni ofte faris kun neevitebla rezulto de retroiro : plifortiĝo de sociaj klasoj kaj fermo de la limoj al la migrantoj.

### **Demografio...**

Je la skalo de nacio, malfermo fontas ĉefe el popolmigrado. Je la monda skalo, ĝi fontas el demografio. Monda solidareco ne eblas, se naskiĝas infanoj, por kiuj neniu antaŭvidis iun lokon en nia mondo : nek la gepatroj, kiuj naskas dek por pluhavi tri. Nek la estraroj, kiuj uzas ilin en militoj, dum kiuj malŝparo de la homa vivo estas parto de la strategio. Nek la cetero de la mondo, kiu konfuze esperas, ke la problemoj iel ajn solviĝos per si mem, dum ĝi trankviligas sian konsciencon per kelkaj almozoj.

Se la sociaj klasoj estas neeviteblaj, prefere ol protekti privilegiojn, oni uzu ilin por mezuri la socian progreson kaj plani ĝin. Ke ili iĝu iloj por socia progreso, kiel la "meza klaso" de la okcidentaj landoj, kie la etburgaro asimilis la plejparton de la laborista klaso, kvankam oni povas bedaŭri, ke tiu klaso samtempe perdas pli kaj pli sian politikan influon, profite al pli kaj pli malvasta elito.


### **Paco kaj espero...**

Mi povas nur esprimi kelkajn dezirojn : Ke oni pensu mondscale, kun sincera volo malaperigi mizeron, kaj disvolvi homan fratecon. Ke popoloj (eĉ tiuj kiuj ne sin agnoskigas tiaj per sangofluo) havu la rajton elekti la sociekonomikan sistemon, kiu plej taŭgas por ili. Ke aperu socia eksperimentado fare de volontuloj (por provi komunismon, memmastrumadon, ekzemple), anstataŭ uzi milionojn da nevolaj kobajoj por tio. Ke, iom post iom, ni transiru al monda socio tra la vojo de Paco kaj Espero.

(daŭrigo en la venonta n-ro)



## Kajto...



En Ambuazo min tre impresis la koncerto de KAJTO. Pure sinceraj artistoj ĉarmis la tutan spektantaron. De la scenejo Ankie, Marian, Marita kaj Nane sukcesis inundi nin per ĝojetoso, kiu trafe kortuŝis min.

La unuan parton ili dediĉis al prezentado de novaj kantoj, kiujn ili nuntempe registradas en studio. Post kelkaj semajnoj naskiĝos do la dua E-kompakt-disko! Jam mi varme rekomendas ĝin al vi. Ok el ĝiaj dek-kvin aŭ dek-ses kantoj rakontas pri vojaĝanta pupteatro, ĉiam atendita en ĉiu vilaĝo de nova infano.

La duan parton de la spektaklo plenigis la jam konataj kantoj de la unua disko. Se la registronivelo estas modela, la koncerta prezento estas grandioza. Tiaj profesiaj muzikgrupoj grave mankas en esperantio. Des pli subtenendaj ili estas!

Dank'al afiŝado de kelkaj refrenoj la publiko estis invitata kunkanti, eĉ kanone! Mia persona bedaŭreto venas, ke certe mankis la popoldancoj, kiujn Kajto scias gvidi. Sed supozeble la salonego ne taŭgis por ili.

Mi alte taksis ilian foriron: diskrete ili malaperis en la dorso de la publiko post komplika kunkantado de ĝisrevida refreno.

Ankie kaj Nanne akceptis malfruan inviton al amika kuntrinkado en nia dormejo. Ili tie tute malkaŝe, spontanee kaj tre simpatie respondis al niaj plej diversaj demandoj. Multajn dankojn al ili ankaŭ pro tio!

Post plurtaga "digestado" de tiu vespero jen tri tekstoj laŭ temoj plej ŝatataj de Kajto: haveno, infano, soci-problemo de la modernigo...


Al la gitaro de Ankie, al la akordeono de Marian', al la fluto de Marita kaj al la bango de Nanne, mi dediĉas ilin.

## La havena trilogio

al KAJTO la 8an de aprilo '91

### *Ardas havena vivo*

Ardas havena vivo  
Laŭtas tumulta vivo  
Movas sin formoj, fumo  
Buntas kostumoj, lumoj




Ridas la mevorondoj  
Bluas ĉielo, ondoj  
Dancas sennombraj ŝipoj  
Ĝojas maristaj skipoj

Bele somero varmas  
En la haveno svarmas  
Fiŝoj jen brile oraj  
Homoj nur bonhumoraj



Tra la foiraj budoj  
Kuras la bubaj ludoj  
Klaĉas la dommastrinoj  
Fluas bieroj vinoj

Kun harmoni', akordoj  
Vibras muzikaj kordoj  
Spiras akordeono  
Kantas kun gurdo fono



Sur la najbara strando  
Flirtas junula bando  
Flikas olduloj lerte  
Retojn plektitajn sperte

Buntas kostumoj, lumoj  
Movas sin formoj, fumo  
Laŭtas tumulta vivo  
Ardas havena vivo





### Patro kaj filo

Mano en mano sin tenas  
Tra bazaró promenas  
Patro fiera trankvila  
Filo revema fragila  
Patro, fiŝisto sen saĝo  
Sorto por vir' de l' vilaĝo  
Sentas feliĉon sen laco  
Ĝuon de l' vivo, de l' paco  
Filo malfermas l'okulojn  
Grande admiras la lulojn  
Maro kaj ŝipoj lin vokas  
Revoj realon primokas

Ŝnuron en mano li trenas  
Lante laŭ kajo promenas  
Knabo fiera trankvila  
Ŝipo revema fragila  
Knabo nun ludas kun saĝo  
Sorto por knab' de l' vilaĝo  
Li mem konstruis ŝipeton  
Kiu ne timas impeton  
Ŝipo malrefas ĉefvelon  
Larĝe avidas sunhelon  
Ondoj kaj fratoj lin vokas  
Revoj realon primokas

### Pasis jaroj

Pasis jaroj  
Balais for tempestoj  
L' havenon de la festoj  
Pasis jaroj  
La knabo fariĝis viro  
Fortika eĉ laŭ diro  
Pasis jaroj  
Lin portis for ĉagreno  
Sed zumas en li refreno  
Post longaj mondmigradoj  
Tra la sezonparadoj  
Forvojaĝanto ofte  
Ĉe l' fin' retrovas softe  
La forlasitajn lokojn  
De la juneco vokojn

Pasis jaroj  
Jam grizas liaj haroj  
Nun lantast liaj faroj  
Pasis jaroj  
Jen horo de l' reveno  
Ĝus sonis ĉe l' haveno  
Pasis jaroj

L' vilaĝo iĝis urbo  
Al parto de suburbo  
La vivo malprosperis  
Ĉar la ŝipoj malaperis  
En tempon ili sinkis  
Maristoj fine drinkis  
Je l' san' de l' fiŝkomerco  
Fiŝindustri', fiŝerco !

Pasis jaroj  
Vizit' ellasas pentojn  
Memor' fajrigas sentojn  
Pasis jaroj  
Dum vivon li konkludas  
Infan' per ŝipo ludas  
Pasis jaroj  
Pasos jaroj...

Marcel



## VORTOJ DE MALJUNULO

— — —  
valo  
— — —

### ĈU KONFUZO, ĈU MIKSO ?

Iu amiko diras, ke mi miksas kontraŭklerikalismon kaj ateismon. Mi ne konfuzas tiujn du ismojn, kiuj ja estas malsamaj. Oni povas esti kontraŭklerikala kaj tamen kredanta (kiel, cetere, oni povas esti klerikala kaj ne sincere kredanta).

Mi eble miksas ambaŭ nociojn, en tiu senco, ke mi estas kaj kontraŭklerikala kaj ateista. Tia estis ankaŭ Lorulot, tion vi konstatos, se vi senantaŭjuĝe legos lian libron.

Mi jam klarigis, kial mi estas ateisto. Kial mi estas kontraŭklerikala? Tial ke la klerikaluloj persistigas en la kredantaro la religian fanatikismon, kiu estas fonto de maltoleremo, trudemo, perfortemo kaj krimoj. Tion ni vidas nun en Irano kaj aliaj landoj kun islamaj integristoj. Oni kontraŭdiros: "Sed en kristanaj landoj jam longe ne ekzistas Inkvizicio, nun regas religia toleremo." Mi respondas: ankaŭ tie ĉi la klerikaluloj ne malarmis, kaj eĉ en Francio, antaŭ nelonge ili sin montris agresemaj. Ni bezonas maldormi, resti vigle atentaj. Lasu ilin reakiri potencon, kaj vi vidos...

Oni diras ankaŭ: ne ĉiuj fanatikismoj estas religiaj. Sendube. Marksismo-leninismo, naciismo, patriotismo estas ankaŭ iaj religioj, kiuj havas siajn integristojn kaj siajn klerikalulojn. Ankaŭ tiujn ismojn ni bezonas kontraŭstari.



*Iuj aldonas : ankaŭ ateismo, anarkismo, sennaciismo havas siajn maltoleremajn fanatikulojn. Ĉu mi estas blinda? Mi vidas esencan diferencon. Propagando, varbemo, eĉ prozelitismo ne estas perforta trudemo. La herezulo Lanti neniam provis trudi al iu ajn siajn ideojn, kiujn li vigle manifestis (eĉ en la tempo, kiam li estis komunisto).*

## Relegante el la "VORTOJ DE K-DO E. LANTI"

*El la artikolo "Intelektulo? - Manlaborulo?" jenaj frazoj eksaltis al mia okulo :*

*"... se mi pensas pri tiu lerta, fama kirurgo, kiu segas ostojn, tranĉas karnon, ligas tendenojn, kudras haŭton, kaj iel aspektas kiel buĉisto, mi tamen ne povas nomi lin manlaborulo. Se tiel mi parolus, tio aspektus kiel mal-sprita ŝerco. La lerto de la manoj ludas tamen ĉe kirurgo grandan rolon en operacio."*

*Ĉi tie Lanti - sen pedanta afekto - metis fingron sur la devenon mem de la vorto kirurgo. Ĝi ja venas de la antikva greka ĥeir, kiu signifas mano. Etimologie la greka vorto ĥeirurgia estas laboro aŭ operacio per mano - manlaboro, kiel siderurgia estas laboro pri fero (sideros).*

*Simile geometrio signifas etimologie termezurado: tre konkreta nomo por tre abstrakta, tre intelekta scienco. Geometro, kiam li ne uzas mezurilojn, rezonas pri figuroj, kiujn li desegnas per sia mano foje helpe de liniilo kaj cirkelo.*

*Ĉiu intelektulo bezonas laborigi siajn manojn, kiel ĉiu manlaborulo pli-malpli bezonas laborigi sian cerbon.*

*Pravis Lanti, rifuzante distingi inter tiuj du vortoj. Cetere lia artikolo tiurilata estas konvinka. (Vortoj de Kdo E. Lanti, p.100-103).*

*Noto de la red. : La du ĉi-suprajn artikolojn amiko VALO verkis kiam li estis ankoraŭ vidkapabla. La ĉi-postan li registris kasede.*

## Songoj kaj nostalgio

Nun por mi ne estas diferenco inter nokto kaj tago. Ofte, tage kiel nokte, mi mallonge dormetas. En miaj songoj mi kuras, grimpas, saltas, plongas, naĝas. Mi remas en kanoto sur Rejno en Majenco. Mi sketas sur la glaciiginta rivero Nahe ĉe Bingen. Mi ŝvebas en malnova aeroplano de la milito de 1914-18 super la urbo Krefeld en norda Rejnlando. Mi rajdas sur ĉevalo, sur biciklo, sur motorciklo. Mi stiras aŭton sur zigzaga monta vojo. Mi kondukas mian lokomotivon laŭlonge de Rejno, inter Majenco kaj Bonno. Mi rekonas ĉiun detalon de tiu fervojlinio, kiun mi precize konas. Mi vidas belajn pejzaĝojn kaj belajn vizitaĵojn. Mi estas juna, vigla, gaja. Des pli amara estas la vekigo.

De post 1924 mi ofte pensis, ke neniam mi revenos al Rejno. Nun, se mi tien irus, mi ne vidus la vitojn, kiuj kovras la deklivojn de la montoflankoj, la mezalte starantajn burĝojn, la mezepokajn vilaĝojn en la fundo de la valo, la florantajn ĉerizarbojn ĉe la piedo de la Lorelej-rokego, kiu reflektas sian imponan mason en la spegulo de la majesta rivero, nek la veaspektan turruinon sur la alta rokego, nek la buntajn florigardenojn en la ridanta urbeto Godesberg. Tiujn belaĵojn redonas al mi la songoj, ĉar ili estas konservataj en precizaj bildoj kun reliefo, koloroj kaj movoj en la filmoteko de mia memoro. Ankaŭ en maldormo mi povas ilin elvoki. Sufiĉas prononci unu vorton, unu nomon kiel Oberwesel aŭ Baŝaraĥ, por ke defilu la tuta serio sur mia interna ekrano.

Mi scias, ke ankoraŭ ekzistas kaj longe plu ekzistos tiu romantika legendoplena Rejn-valo, glorita en franca prozo de Viktoro Hugo, en germanaj versoj de Henriko Heine, de la reĝino-poetino Carmen Sylva kaj de multaj lid-aŭtoroj, en ventraĵoj de Astudin, en muziko de la Rejnlandano Schumann kaj de la giganto Wagner.

Mi scias, ke starante sur la ferdeko de kontraŭflue naĝanta ŝipo, mia filo en sia 60-a jaro rigardis kun admiro kaj emocio tiun grandiozan kadron, en kiu li estis koncipita.

Mi scias ankaŭ, ke ĉiutage miloj da homoj povas ĝui tiun mirindan spektaklon. Kaj en mia saŭdado tiu penso estas konsola.



## La kantileno de la maljuna diboĉulo

Ho Diboĉo! mia volupta diino,  
Kial vi tiom malnoble pritaktas min?  
Ĉu mi ne estis unu el viaj plej bonaj servistoj?  
Ĉu mi ne elspezis sufiĉe da mono por via adorado?

Mi tamen fervore vizitis viajn templojn,  
Eluzante dum tutaj noktoj mian sanon;  
Honore al vi, mi eksperimentis la tutan Kamasutron  
Kaj, tiucele, unue ĉeestis gimnastikkurson.  
Dank'al tio, mi eĉ estas la ununura kiu sukcesis  
Realigi la faman laŭdire ne plenumeban pozicion:  
"La Magian Tirkeston".

Milojn da erotikaj libroj mi aĉetis,  
Eĉ la librojn de S-ro Beaucaire,  
"La libron de Amo" de Peneter, sen forgesi  
"La Dudek Noktojn de Satano".

Mi elprovis ĉiujn eblajn afrodiziigaĵojn,  
Riĉigante armeon da ŝtelĉasistoj  
De rinoceroj kaj kantaridoj.

Montegon da ĉampanboteloj  
Mi uzis por bani miajn amorantinojn,  
Post kiam mi montris al ili  
Mian belegan kolekton da japanaj gravuraĵoj.

La listo de miaj diboĉaj heroaĵoj  
Estas senfine plilongigebla.

Kaj nun, maldankema kaj kruela diino,  
Kiel vi rekompencas tutan humilan vivon je via servo?  
Vi forlasas min en mia soleco,  
Mokante mian elĉerpitan virajon  
Kiu eĉ ne plu spertas orgojlajn matenojn.

Henri CASTIAU

La suban artikolon mi verkis por "Monato" antaŭ pli ol jaro. Pro nekonataj al mi kialoj ĝi neniam aperis. Eble la redaktoro de "Monato" konsideris ĝin tro skandala? Vidante ke la temo iĝas pli kaj pli aktuala en nuna Orienta Eŭropo kaj komenciĝas debatoj pri ĝi, mi proponas ankoraŭ aktualan artikolon por legantoj de "Laŭte!", farinte en ĝi etajn ŝanĝojn.

## ABORTIGOJ EN SOVETIO

Dum multaj jardekoj, kiam temis pri la sanprotektado en Sovetio, oni tuj aŭdis impresajn nombrojn: miloj da kuracistoj, milionoj da litoj en hospitaloj, miliardoj da rubloj ktp. Tiuj nombroj estis plaĉaj por sovetiaj oficialuloj kaj ili volonte parolis pri ili. Multaj naivuloj en aliaj landoj ĝis nun havas idilian bildon pri "eksterordinara zorgado pri homoj en la unua socialisma lando de la mondo". Ekzistis ankaŭ aliaj nombroj, kiujn oni preferis kaŝi. Nur la nuna Glasnost-epoko ebligis malsekretigi tiujn informojn. Multaj sovetianoj konsternite eksciis ke ilia lando troviĝas en la 50-a loko en la mondo pri la infana mortaltato, t.e. ke en Sovetio mortas 3-4-oble pli granda procento de infanoj ol en ajna evoluinta lando. Finfine kuracistoj ekparolis laŭte pri la aktualaj problemoj de sovetia sanprotektado. Kaj ili komencis demandi sin pri la kialoj de ĝia plaga stato.

En la semajna revuo "Ogonjok" (n-ro 33 1988), tre populara nun inter sovetia legantaro, aperis artikolo de medicinisto Andrej Popov "Kiam ne estas elekto" pri abortigproblemoj. "Abortigo" ne estis tabua vorto dum lastaj jardekoj, la operacio estis malpermesita en 1936-56, poste denove permesita. Nun abortigo apartenas al sovetiaj banalaĵoj kaj en la vulgara lingvo ricevis nomon "ĉistka" ("purigo").

La aŭtoro prezentas aliajn impresajn nombrojn: en la tuta mondo ĉiujare oni faras 30 milionojn da abortigaj operacioj, el ili - 8 milionojn en Sovetio. "Evidentiĝas ke ĉiu kvara abortigo en la mondo estas nia, sovetia, kvankam la loĝantaro de Sovetio konsistigas nur 5-6 % de la tutmonda". "En Sovetio estas la plej alta nivelo de abortigoj. Ĝi estas 2-4-oble pli alta ol en eŭropaj socialismaj landoj kaj 6-10-



oble pli alta ol en evoluintaj kapitalismaj landoj". Krome, atentigas l'aŭtoro, la nombro 8 milionoj rilatas nur registritajn, en kliniko faritajn operaciojn. "Do se kalkuli eksterklinikajn abortigojn, rezultos ke ĉiujare ne ĉiu deka, sed ĉiu kvina virino de infamaska aĝo faras unu abortigon!"

Kial tia terura situacio? Ĉu eble sovetiaj virinoj principe rifuzas naski infanojn? Aŭ eble ili estas iaspecaj masohistoj? Des pli ke "sovetia abortigo" tute ne similas la okcidentan. "Sendolorigaj medikamentoj sufiĉas ne por ĉiuj..." - diras A. Popov. La respondo kuŝas en ĉiutaga sovetia vorto : deficito, t.e. konstanta manko de kontraŭkoncipaj rimedoj. Jen kiel aspektas la realeco en RSFSR (Rusia Soveta Federacia Socialisma Respubliko):

"Se ni interkonsentos ke la bezono de la loĝantaro de RSFSR estas 100 procentoj, rezultos ke en 1980 tiu bezono estis kontentigita je 25 procentoj. Tio signifas ke tri el kvar virinoj foriris al apoteko kun konscio pri vivmalfacilaĵoj, sed sen bezonata varo". "Sed se esti preciza kaj paroli ne pri averaĝoj, rezultos ke aĉeti kondomojn sukcesis nur 20% de aĉetantinoj, diversajn kemiajn rimedojn - nur 2% (ne estas eraro - nur du virinoj el cent!) ... kontraŭkoncipajn pilolojn - 20% de aĉetantinoj."

La nuna sovetia merkato sukcesas pli-malpli kontentigi bezonojn de 10 virinoj el 100. Kio do restas por aliaj? - "...abortigoj, antaŭgeedzigaj kaj eksteredzigaj infanoj, forrifuzo de naskitaj infanoj, nedeziritaj kaj ne amataj infanoj, infanmortigoj..." Kiam mankas kontraŭkoncipiloj kaj abortigoj estas permesitaj, oni troviĝas en la situacio kiam "la abortigo estas en nia lando ĉefa metodo de famioplanado, kaj tiurilate nia lando vere estas unika en la mondo. Asertoj pri alternativeco de abortigo kaj kontraŭkoncipaj rimedoj estas tre alta scienca abstraktaĵo, havanta tre malgrandan rilaton al la reala vivo de niaj virinoj".

L'aŭtoro pledas pri urĝa neceso produkti grandkvante altkvalitajn kontraŭkoncipajn rimedojn por malpliigi la kvanton de abortigoj. Povas ŝajni, ke finfine la krion oni atentos. Tamen... ekzistas ankaŭ alia flanko de la problemo. "Kaj tamen ekzistas propra, "ceĥa" intereso de la Ministerio de la sanprotektado. La problemo kuŝas en tio

ke, laŭ al specialistoj konataj informoj, preskaŭ duono de niaj akuŝistoj-ginekologoj estas okupata nur per abortigo-operacioj. Preskaŭ duono el 60-mila armeo de sovetiaj akuŝistoj-ginekologoj..." Por multaj kuracistoj abortigoj iĝis unu el ĉefaj rimedoj gajni monon. Se virino faras abortigon eksterklinikan, ŝi pagas 50-100 rublojn, kiuj iras en la poŝon de kuracisto. Enklinika abortigo kostas proksimume 100 rublojn. Do por abortigoj en Sovetio ĉiujare estas elspzata unu miliardo da rubloj. "Informo por nespecialisto : tiu ĉi sumo konsistigas 20-onon de la tuta jara buĝeto de la sovetia sanprotektado! Jen tiel : ĉiun dudekan "medicinan" rublon ni uzas por abortigoj".

Kial miri ke la infana mortalitato estas tiom alta? Sovetiaj ginekologoj-akuŝistoj estas ĉefe okupataj pri abortigoj, kaj restas por ili nek tempo, nek necesa mono por okupiĝi pri aliaj problemoj.

Ĉu Perestrojka tuŝos ankaŭ la sferon de sanprotektado? Ĉu suferoj de sovetiaj virinoj daŭros? Kiom longe ankaŭ kontraŭkoncipaj rimedoj apartenos al varoj tre malfacile akireblaj?

"Multas laboro antaŭe. Medicinaj revuoj publikigas nun sur la unuaj paĝoj artikolojn pri rekonstruo en la sanprotektado. Ege mi deziras ke post la vortoj sekvu faroj kaj ke la loĝantaro ekhavu realan eblecon ne nur aborti, sed ankaŭ uzi por famioplanado modernajn kontraŭkoncipajn rimedojn, informojn, kvalifikitan medicinan helpon.

Nur tiam eblos paroli pri konscia patriniĝo, nur tiam malaperos ĉe ni gravedaj neplenkreskulinaj, steriligitaj post abortigo virinoj kaj forlasitaj al sortokapricoj infanoj.

Olga Kerzjuk  
(Oksana)

Leili Andre  
(Tradukis Johannes Palu)

NASKIĜO

Trifoje  
naskiĝas  
homestaĵo.

Foje, kiam  
trafas okulon  
sunradi'.

Due kiam  
la lumo  
en koron penetras.

Trian fojon,  
se la koro mem  
lumradias.



## POR FRUE LERNI LA ANGLAN LINGVON

En la varmeĉo de la patrino ventro oni povas de nun inici la fetojn je la ŝekspira lingvo.

Laŭ Ellen Roy, skotlanddevena instruistino, kiu nun loĝas en departemento "Korezio" (Francio), por tio necesas nur : aŭskultilo, kasedoj kun lulkantoj en la angla, por ke tiuj beboj fariĝu poste perfektaj dulingvuloj.

De sep jaroj ŝi praktikas tiun antaŭnaskan instruadon. Ŝi asertas, ke la infanoj, kiuj lernis la anglan lingvon per tiu metodo, prononcas perfekte, eĉ pli bone ol tiuj el dulingva familio. Sed necesas tamen kelkaj devigoj :

Dum la kvin lastaj monatoj de la gravedotempo, fiksi sur la ventro aŭskultilon, kiu lulas la feton laŭ ritmo de anglaj melodioj, tio dum du aŭ tri horoj tage, sed po 45 minutoj ĉiŭfoje, ĉar post tiu tempo la feto ne plu aŭskultas kaj ekscitiĝas.

La fakuloj jam asertis, ke la feto post kvar monatoj kaj duono estas atenta al la eksteraj bruoj. De longe oni sciis, ke ĝi aŭdas. Nun oni scias, ke ĝi aŭskultas, ĉar en tiu periodo de la gravedotempo la interna orelo kaj la timpano estas jam formitaj. Sed por encerbigi tiujn unuajn elementojn de la angla lingvo estas preferinda milda melodio ol "roko" de la "Rolling Stones"-grupo, ĉar tiu lasta muziko povus provoki ĉe la infano nervan malekvilibron. La patrino devas uzi la aŭskultilon, nur kiam ŝi estas certa, ke la feto vekigiĝas kaj estas aŭdkapabla. La tradiciaj akcelaj metodoj por la lernado de la lingvoj estos baldaŭ metindaj en la muzeon de la antikvaĵoj. Oni ne haltigas la progreson!

Laŭ "Sud-Ouest", regiona franca ĵurnalo, esperantigis J.G.

\*\*\*\*\*

Kvazaŭ ilustre al la ĉi-supra eĉo el la lingva batalkampo, jen en la venontaj paĝoj eĉo de Mark FETTES, redaktoro de la UEA-revuo "Esperanto".

Ĝi estas disponebla ankaŭ kiel aparta broŝuro kun mendo AU, vendoprezio : 5 FF, kaj povas akompani la samteman kasedon mendeblan ĉe la libroservo de SAT-Amikaro : B. SCHNEIDER, 38 av. de la République, F 94320 THIAIS.

La kasedo estas registraĵo de prelego okazinta en la Kultura Kunveno de la Pariza SAT-rondo en Pompidou-Centro 1991.02.10.

(daŭrigo de la artikoloj p.21/40 post la 20-paĝa eĉo)

## AL UNU LINGVO POR EŬROPO ?

### LA ESTONTECO DE LA EŬROPA BABELO

Mark Fettes

"Mi konkludas, ke la problemo de lingvo por internacia komunikado nun prezentiĝas kiel la konflikto inter planita lingvo Esperanto, pri kiu oni scias ke ĝi funkcias kontentige por siaj uzantoj, kaj hegemonia nacia lingvo, kiu, kiel ni ĉiuj scias estas hodiaŭ la angla."

André Martinet (1989)

Eventuale kelkaj legantoj de ĉi tiu eĉo, renkontinte la supran opinion, jam mienas surprizite aŭ skeptike. Koncepte egalrangigi Esperanton - ligitan mense por multaj homoj kun nebula kaj fundamente malsukcesa utopio - kun la leviatano de la mondo angla, ŝajnas porti la debaton ekster sencohavajn limojn. Kaj tio, efektive, estis la akceptita starpunkto de la ĉefaj fluoj en la eŭropa lingvodiskurso dum la pasinta jarcento. Ĉi-ese mi provos montri, kial tio okazis, kiel la koncernaj faktoroj eventuale ŝanĝiĝas, kaj ke Martinet efektive identigis du polusojn de tre fruktodona debato pri dualingva komunikado. Kvankam, esprimante la supran opinion, Martinet kredeble pensis pli monde ol eŭrope, la ĉefa demando restas esence sama : Kian rolon havas la raciismo en la homaj aferoj, kaj specife, kian rilaton al la politikaj, kulturaj kaj psikaj aspektoj de la lingvo? Jen vastaj temoj, kaj ni ĉi tie limigos nin al skizo de la batalkampo inter la Esperanta Davido kaj la angla Goliato. Espereble ni kolektos kelkajn utilajn fragmentojn, falintajn de la misiloj ĵetitaj super niaj kapoj.



Por komenci, povus esti utile memorigi al ni la efektivecon de la eŭropa lingvoproblemo. Same kiel multaj heredaĵoj el la prahistorio, la eŭropa Babelo ofte eskapas kritikan atenton : ni malofte haltas por interfrontigi papagajn asertojn pri la kontinueco de la eŭropa penso kun surlokaj realaĵoj. Laŭ la reganta mito, jam de jarcentoj la intelekta interŝanĝo por laborantoj en la ĉeŝfluo okazadas senprobleme ; sed kiu povas diri, kiajn latentajn interkonektojn, kiajn ekbrulojn de samideeco disigas la eŭropa lingva malordo? Ne temas plu hodiaŭ pri problemo nur por eta, plurlingva elito. Pli da homoj ol iam antaŭe, dank'al la disvolviĝo de scienca kaj kultura kunlaboro, de komerco kaj vojaĝado, venas vole-nevole en kontakton sen la povo interparoli. Lastatempa publika enketo konkludis, ke "la vere ĝusta kompreno de la angla lingvo (en okcidenta Eŭropo)... rimarkinde malsuperas niajn plej pesimismajn atendojn", estante limigita al ĉ. 6% de la loĝantaro (Van de Sandt 1989); aliaj lingvoj supozeble malsuperas tion, kaj la ciferoj por aktiva lingvoregado estus ankoraŭ pli malaltaj. Kion signifas paroloj pri unuiĝanta Eŭropo, kiam hazarda specimeno el ĝiaj loĝantoj, metita en unu ĉambron, apenaŭ povus esperi interkonsenti pri io ajn, krom, eventuale, la dezirindeco de tuja eskapo?

Aliflanke, kompreneble, la lingva diverseco portis kun si grandegajn riĉojn. La duonaŭtonoma evoluo de ĉiu nacia kulturo (en kiu povas disflori multaj apartaj variaĵoj regionaj kaj sociaj) dependas fundamente de la ŝirma lingvomuro. Pro tio, kaj eble kun la aldona motivo, ke plurlingvismo donas aŭtomatan avantaĝon al la bone edukitaj, la avantaĝoj de unulingvismo estas malpopulara diskutemo krom inter tiuj, kies lingvon oni proponas por tiu rolo. Nia temo de "komuna eŭropa lingvo" ne povas celi, do, al komuna unua lingvo por la kontinento, se ni ne deziras teksti (mal)utopiajn fikciojn. Oni povas amasigi armeon da praktikaj, etikaj kaj politikaj konsideroj por subteni tiun aserton (vd. ekz. Hagège 1986).

Ĉiuj ĉefaj eŭropaj politikaj institucioj subtenas la plurlingvismon. Jam nur en okcidenta Eŭropo, la Konsilio de Eŭropo, la Eŭropa Komisiono, la Eŭropa Parlamento kaj

la edukministroj de la EK-ŝtatoj-membroj ĉiuj akceptis ene de la lastaj jaroj rezoluciojn favorajn al la "lingva plurismo" kaj la pli intensa instruado de la lingvo de la Komunumo - je la kosto, kompreneble, de lingvoj el ekster la Komunumo. Oni ja povus diskuti, ĉu eĉ la relative modesta celo instrui tri (el naŭ) EK-lingvojn al ĉiu civitano estas atingebla aŭ atinginda, se oni konsideras la ĝisnunajn spertojn en la fremdlingva instruado (Chiti-Batelli 1988, p. 57-91). Tamen la plurlingvismo restas la sola politiko akceptebla por ĉiuj EK-landoj, kaj la samo certe validas por la tuta Eŭropo.

Ĉio ĉi tamen ne ekskludas la ekestigon de komuna dua lingvo. Fakte oni trovas tiun ideon trafadeti la historion de Eŭropo de post la Klerigo (Large 1985, p.43-63). Malantaŭ ĝi kuŝas la ombroj de la romia imperio kaj la mezepoka eklezio, paliĝantaj prateksto montrantaj al perdita (kaj duone imagita) lingva unueco; kaj pli malfrue, la revoj pri lingvo de universala kompreno (Knowlson 1975). Sed temas pri ombroj kaj revoj nur : aliaj, malpli difinitaj fortoj nun kunligas kaj muldas la kontinenton, kaj por ili malmulton signifas la antikva armea lingvo iĝinta liturgia kaj klerika komunikilo, aŭ la esploraj lingvistikaj palpadoj de Wilkins kaj liaj samideanoj.

Efektive malcertas, kia procezo estas la eŭropa unuiĝo, kaj kiajn sekvojn ĝi kunportos por la lingvopolitiko. Pragmataj ekonomiaj motivoj (kiuj mem forte tendencas al unulingvismo) apudas internaciismon kaj "eŭronaciismon", kiun siavice inspiras romantikaj vizioj pri pasinta gloro, izoliĝemaj sopiroj al memredifino, aŭ novkoloniisma engaĝo por pli granda peco el la monda torto. Eĉ protesta legimitiĝo ene de EK povus esti la celo por iuj ŝtatoj, fronte al internaj displitiĝoj (oni pensas ekzemple al Hispanio kaj Katalunio). Kaj la geografia difino mem de Eŭropo restas malklara, kun ĉiuj sekvoj por la akcepteblereco de komunaj laborlingvoj kaj la praktikebleco de EK-tipa lingva egaleco (jam, kun naŭ lingvoj, ĉe la rando de disfalo). Do, nia konsiderado de la kandidatoj por eŭropa interlingvo komenciĝas per eseo koncerne la difinon de



Eŭropo mem. La postulojn al tiuspeca lingvo fiksis nepre la socia kaj politika situacio: Eŭropo de 30 landoj eventuale bezonus aliajn solvojn, ol Eŭropo de la Dek Du; Eŭropo de 80 landoj ankoraŭ aliajn.

Du lingvistikaj konsideroj aldone kontribuas al la difino de la problemo, ambaŭ koncerne la "profundecon" de komuna eŭropa lingvo. Unue, kiaj estos ties sociaj funkcioj? Se ni akceptas, ke malmultaj eŭropanoj deziras la malaperon de la lingva diverseco, tiam devos ekzisti funkcia disdivido inter la interlingvo kaj la lokaj lingvoj. Ŝajnas same neakceptebla, ke tia lingvo estu limigita al iu aparta klaso aŭ grupo de profesioj, iuspeca "eŭroelito" (kvankam ĝuste tion praktike legitimas la nuna politiko de plurlingvismo). Fine, la ligoj inter lingvo kaj kulturo estas tiom proksimaj, ke estus senutile pensi al lingvo uzata "sole" por la intersanĝo de informoj. Se tiuj postuloj ŝajnas malakordi inter si rilate al specifa lingvo, necesas demandi nin, ĉu efektive tiu povus funkcii kiel stabila interlingvo.

La alia, parenca faktoro koncernas la lerneblecon de la lingvo, se ni akceptas ke ĝi devos esti dua, nedenaska lingvo (lasante do la denaskan dulingvismon ekster konsidero, kiel apartenan al eĉ pli fora estonteco). Ni devos unue memori, ke la interna disvolvigo de unuopaj lingvokomunumoj mirige varias, eĉ ene de la relative limigita gamo de lingvoj pritraktata ĉi tie. La foje preskaŭ fanatika purismo de la franca faras akran kontraston kun la senĝena vortimportado de la norde najbara nederlanda; la obstina rezisto de la brita angla lingvo al ortografia aŭ gramatika reformo difinas kontraŭan poluson al la konsekvenca tajlado de la hispana aŭ estona. La ĉeĥa, korprofunde en Eŭropo, konas unikan gradon de malsimileco inter siaj skriba kaj parola formoj. Oni povus daŭrigi pli detale, sed devus jam esti evidente, ke, je la popollingva nivelo, Eŭropo neniel posedas unuecan lingvotradicion. Trejnitaj fakuloj kompreneble povas liberigi sin, iugrade, de la subkonsciaj antaŭsupozoj semitaj dum la lernado de sia denaska lingvo. Sed la plimulto de la uzantoj de

dua komuna lingvo havas nenian tiucelan trejnadon: por ili interlingvo riskus kunporti senton de fremdeco, eĉ de malĝusteco, tie kie ĝi trompus iliajn atendojn laŭ la pollingvistiko.

Ni fakte renkontas ĉi tie la problemon de nesupereblaj diferencoj inter lingvoj, kiun George Steiner metis centren en sia studo de (precipe eŭropa) tradukado, **After Babel** (1975). Tiaj diferencoj kompreneble ne malebligas la lernadon de dua lingvo, eĉ ĝis nivelo karakteriza por denaska parolanto. Sed ili ja severe limigas tion kion oni povas atingi sen kompleta mergiĝo en la koncerna lingvo-medio. Steiner komentas pri "teknike lertaj" japanaj studentoj de la angla: "Ili diras tiom multe korekte, tiom malmulte ĝuste." (1975, p.470). Ni devas demandi, kiu grado de "ĝusteco" estas atingebla, kaj kiu necesa, en eŭropa interlingvo por nedenaskuloj.

La celo de la ĉi-supraj konsideroj estas montri ke, se ni volas serioze pritrakti la koncepton de komuna eŭropa lingvo, ni devos preti postuli la maksimumon. Ĝi devas kontentige funkcii kaj parole kaj skribe, esti malfermita al sufiĉe libera partopreno de ĉiuj eŭropanoj (kiel ajn difinitaj), kaj povi esprimi la kompletan gamon de la transnacia eŭropa pensado en maniero, sentata kiel adekvata de ĝiaj parolantoj. Lingvo, kiu plenumas tiujn kondiĉojn nur parte, estas nur unu "eŭropa lingvo", granda aŭ malgranda depende de la uzantoj, sed ne posedanta unikan statuson.

La plej granda parto de ĉi tiu eseo konsistas el ekzameno de la gradoj, je kiuj la angla kaj Esperanto ĉe siaj respektivaj polusoj respondas al tiuj postuloj. La unua estas neplanita etna lingvo kun pli ol 300 milionoj da denaskaj parolantoj, inkluzive de pli ol 50 milionoj ene de Eŭropo mem; ĝiaj kvalifikoj baziĝas grandparte sur la nuna efektivo kaj sur apelo al ekonomiaj realaĵoj. La dua evoluis tra jarcento da limigita sed internacia uzado, ekde relative strikte planita fundamento ĝis vivanta interhoma komunikilo de "libervola, neetna, neteritoria parolkomunumo" (Wood 1979), bazita grandparte en Eŭropo, en kiu denaskaj parolantoj ludas statistike ne-



glektindan rolon. Mi ne celas implici, ke tiuj du lingvoj estas la solaj imageblaj kandidatoj por komuna eŭropa lingvo, nur ke ili adekvate difinas la gamon de proveblaj solvoj.

La angla hodiaŭ konsistigas, laŭ ĝenerala opinio, la plej fortan kandidaton por lingvo preskaŭ ĉie uzebla, ĉu eŭrope, ĉu aliloke; tiu frazero de Martinet, "kiel ni ĉiuj scias", sentigas la evidentecon de tiu supozo. La brita kaj usona koloniismo kaj ekonomiaj imperioj sukcesis porti la lingvon al la kvar anguloj de la mondo; ĝian pozicion sukcesis enfosi precipe la teknologia dinameco de Usono, certigante, ke per ĝi oni akiras pasporton al grandega merkato kaj vasta gamo de informoj. Ekde la komenco de ĉi tiu jarcento, la internacia unuarangeco de la angla fariĝis ĉiam pli evidenta, ĝis tiu grado ke iuj parolantoj, nedenaskaj samkiel denaskaj, profetas ĝian enradikiĝon kiel vere universala lingvo.

Al tiu eblo la intelektuloj reagis diversmaniere. Forta pensfluo en la socialismo bonvenigis tre frue la disvastiĝon de kelkaj eŭropaj lingvoj, kiel kontribuon al la integriĝo de la monda socio (Lins 1987). Eĉ konservativuloj, zorgemaj pri sia propra nacia kulturo kaj identeco, tamen ofte identigis sin almenaŭ parte kun la komercaj kaj koloniigaj fortoj malantaŭ la angla, tiel kiel pli frue ili akceptis volonte la francan kiel la superan komunikilon de la eŭropa kleriĝo kaj la internacia diplomatio. Oni ankoraŭ ofte renkontas defendantojn de tiuj opinioj, kutime sub la standardo de eksplicita unulingvismo.

Sed tiaj opinioj ĉiam pli malakordas kun la moderna konscio pri la profunda rolo de la lingvo en la homaj aferoj. Unu el la malakceptantaj tradicioj devenas de la lingvistoj mem, precipe de la lokaj esploristoj. Tipa estas la sekva ve-kanto de kronikisto de la neanglaj lingvoj en Britio: "La solaj, kiujn la angla ne tuŝis, estas la pikta kaj la kelt-pikta, mortintaj en norda Skotlando antaŭ ol la angla penetris ĝis ili. Ĉar la angla estas mortiganto... Estas la angla, kiu ekstermis la kumbrean, la kornvalan, la nornan kaj la manksan. Estas la angla, kiu nun komplete anstataŭis la irlandan kiel unuan lingvon en Norda Irlando. Kaj

estas la angla, kiu konsistigas tiel grandan minacon al la kimra kaj la skot-gaela, kaj al la franca en la Normandaj Insuloj, ke en longa perspektivo ilia estonteco ŝajnas tre duba... Oni sole povas klopodi, kvankam senprofite, diveni ĉu post cento da jaroj la Britaj Insuloj, je netaksebla malprofito al si mem, submetiĝos (ĉar maltaŭgas la vorto 'atingos') al neenviinda lingvosameco ne konita de post la komenco de ilia registrita historio." (Price 1984, p.170 kaj p.241) Kvankam la situacio en Eŭropo ne avancis ĝis tiu punkto, la samajn vortojn eventuale eĥus multaj antaŭ la perspektivo de establiĝonta anglalingva hegemonio.

La evoluigo de la naciismo ĝis gvida ideologio por pli ol 160 sendependaj ŝtatoj kunportis proprajn konsekvencojn. En 1945 ne eblis al la naskiĝantaj Unuiĝintaj Nacioj limigi je du - la angla kaj la franca - siajn oficialajn lingvojn, kiel la Ligo de Nacioj. En 1965, ĉe la fondo de Eŭropa Komunumo, oni jam sentis bezonon garantii al la lingvoj de ĉiuj ŝtatoj-membroj egalecon sub la Eŭropa Ĉarto - kvankam de komence estis evidente, ke iuj lingvoj estos "pli egalaj ol aliaj" kiam temas pri la ĉiutaga gvidado de Komunumaj aferoj. Kaj ankoraŭ nun UN frontas konstantan premon de grandaj lingvokomunumoj ne inkluditaj en la aktuala provaranĝo, dum du ŝtatoj de EK, Irlando kaj Luksemburgio, devis konsenti ne kampanji por egaleca traktado de siaj malgrandaj oficialaj lingvoj.

Tamen, politikaj dekalroj ne ĉiam havas multan influon sur la ĉiutagan realon. Estas tre malfacile trovi fidindajn statistikojn pri la uzo de la angla kiel dua lingvo, ĉu en Eŭropo, ĉu aliloke: kontraŭ tio batalas la karakteriza fluideco de lingva komunikado kaj la malfacileco elekti taŭgajn datumkriteriojn. Sed staras ekster dubo, ke la angla estas perceptata kiel altprestiga, multuzata lingvo, kies akiro tuj profitigas la lerninton. Ĉirkaŭ 99% de la nederlandaj abiturientoj studis la anglan kiel sian ĉefan fremdan lingvon; la ciferoj aliloke en Eŭropo, kvankam malpli altaj, tamen superas tiujn por iu ajn alia lingvo. Iugrada rego de la angla, almenaŭ skribe, necesas en multaj profesioj, plej notinde en la natursciencoj. Tamen eble troigis George Steiner kiam li asertis, ke la angla

ŝajnas "enkorpigi por viroj kaj virinoj tra la mondo, precipe por la junaj, la senton de espero, de materia progreso, de sciencaj kaj empiriaj proceduroj" (1975, p.468). Por la pli multaj junaj eŭropanoj, oni emas suspekti, la angla vidiĝas pli kiel la lingvo de MacDonalds kaj Hollywood, de rapida kaj relative malmultekosta kontentigo sen multo malantaŭ ĝi. La pretendata lernfacileco de la angla, kiu, kiel atestos iu ajn dualingva instruisto, karakterizas nur la plej bazajn, sentensajn, senidiomajn tavolojn de la lingvo, devas mem, se ĝi faras entute ion, refortigi tiun sintenon. Steiner mem parolas pri "maldika tavolo, mirinde fluema, sed sen adekvata bazo" (1975, p.470).

Por prilumiga perspektivo al tiu manko de "bazo", ni povas turni sin al alia poliglota lingvisto, en lando kie la angla jam akiris la pozicion de nacia interlingvo. Daŝgupto (1988) pensinstige skizis kelkajn eblajn kaŭzojn de la kreo-diferencoj inter la sanskrita ĉe sia apogeo, inter ĉ. 500 kaj 1000 p.K. kaj la bharata angla hodiaŭ. La grandaj sanskritaj verkistoj laboris en epoko, kiam ilia lingvo ne plu posedis denaskajn parolantojn ie ajn en Bharato kaj ekzistis pure kaj nure kiel lernita, "artefarita" komunikrimedo. La hodiaŭa angla, en plena kontrasto, restas ligita al "naturalisma" popollingvistiko enkorpigita en 300 milionoj da denaskaj parolantoj ĉirkaŭ la mondo. Daŝgupto argumentas, ke la du- aŭ tri-lingva bharata parolanto de la angla ne kapablas senti la anglan "natura": skribante aŭ parolante ĝin, oni faras elekton tro realan, tro aktualan, kiaj ajn la flueco aŭ teknikaj detaloj de la lingvomanipulado. La rezulto estas kreo-paneo: "Dum la angla regas en Bharato, la bharata angla restas senlegitima en la anglalingva mondo; ĉi tiu interna ambigueco... certigas, ke la problemoj priskribitaj de Rajeev Patke en sia artikolo (t.e. la manko de unuaranga anglalingva kreado interne de Bharato) ankoraŭ dumlonge persistos." (Daŝgupta 1988, p.25).

Dum tiu rimarko koncernas specife la bharatan ekzemplon, ĝi tuŝas multe pli ĝeneralan problemon al kiu ni pli frue aludis. Iu ajn socio, kiu esprimas sian propran kultu-

ron en alia lingvo ol la angla, frontos funkcia disdividon inter la "intera" lingvo kaj la indiĝena. La spertoj jam sugestas, ke tio povas ne nur distranĉi la anglan de indiĝenaj kreoradikoj, sed ankaŭ malstabiligi ĝin. En la lastaj jaroj okazis tute ne atendita lingvo revolucio en Filipinoj, kie la altprestiga publikan rolon de la angla abrupte forkaptis la tagaloga (Branegan 1989). Oni facile imagas renversojn en aliaj evolulandoj, lige al reaserto de la nacia identeco, eventuale eĉ al mondskala malpligravigo de la angla.

La signifo de ĉio ĉi por la eŭropa situacio estas nenial margena. Ja, la angla estas efektive la lingvo de eŭropa nacio, kaj oni do povus argumenti ke ĝia semantiko, eĉ ĝia gramatiko pli proksimas al la komuna kultura normo en Eŭropo ol en Bharato kaj Filipinoj. Sed ĝia geografia kaj lingva bazo restas periferia. La landoj, kiuj plej sukcese integris la anglan en la ĉiutagan vivon, estas la najbaroj: Irlando (efektive tro sukcese, se oni zorgas pri ĝia indiĝena lingvo), Nederlando, Svedio kaj la ceteraj skandinaviaj landoj. Okcidenta Germanio postlamas: la francoj aŭ indiferentas, aŭ obstine oponas. Preter norda Eŭropo la pozicio de la angla estas ne pli forta ol en multaj aliaj mondopartoj: ĝi estas grava lingvo, sed lokaj kulturaj kaj politikaj rilatoj ofte superpezas ĝin, eĉ en la plurlingva frakcio de la loĝantaro.

Kaj kio pri la statuso de la angla en tiuj landoj, kie ĝi estas ĝenerale akceptata kiel dua lingvo? La vizitanto al Nederlando baldaŭ ekkonscias pri la premo de la angla sur la ĉiutagan vivon: La televido, radio kaj preskomunikiloj portas ĝin en ĉiun hejmon kaj la lernejkortajn konversaciojn de infanoj; reklamistoj uzas ĝin por spici sian mesaĝon, ĵurnalistoj rifuĝas al ĝi kiam ekmankas la hejmaj vortoj. Fojfoje aŭdiĝas la ekstrema opinio, ke la nederlanda cedos al la angla la rolon de nacia lingvo ene de du generacioj. Sed al ekstere observanta anglalingvano, ĉio ĉi ŝajnas supraĵa. La nederlandanoj regas la anglan multe pli pasive ol aktive, cele kompreni filmojn kaj tekstojn, ne produkti ilin. Samkiale la angla restas stajnera "maldika tavolo". La nederlandaj muzikgrupoj ofte prezentas



angle, sed nederlandaj aktoroj nur malofte kaj nederlandaj verkistoj (kompreneble!) neniam. La vendoj de nederlandlingva traduko el anglalingva originalo multe superas tiujn de la originalo mem.

Ĉio ĉi forte apogas plivastigon de la tezo de Daŝgupto pri dualingva kreiveco al la eŭropa situacio, kaj samtempe memorigas nin, ke estas nenio certa pri la nuna pozicio de la angla. Lingvo devas esti konstante relernata de generacio post generacio por teni sian lokon; kultura, ekonomia aŭ politika evoluo povas rapide konduki al mirigaj ŝanĝoj. La pozicioj en Eŭropo de la latina kaj, poste, la franca, sendube ŝajnis siatempe neŝanceblaj. Post la angla nun jarcenton kaj duonon senĉese fluis la tajdo, sed la statistikoj pri ĝia efektiva uzado en Eŭropo, laŭ la pli frue citita studo, estas nepre ne imponegaj (Van de Sandt 1989). En tiu lumo la malsukceso de Sky Channel, gajni signifan parton de la eŭropa merkato, aspektas ne malbonŝance sed neeviteble. La rolo de la angla en la eŭropa konscio ne estas tiu de vulgara popollingvo, sed de necesa komunikilo en bone difinitaj situacioj. La partoprenintoj de internaciaj konferencoj senpene rekonos la postprelegan fenomenon de nacilingvaj grupiĝoj vivoplene babilantaj, kiam antaŭ kelkaj minutoj oni interdiskutis en adekvata sed formaleca angla.

Se obstakloj politikaj, kulturaj kaj psikaj limigas la eblajn, ke la angla iam fariĝu la komuna lingva tegmento de Eŭropo, sen supozi tute neantaŭvideblan perdon de identeco flanke de la diversaj eŭropaj popoloj, tiam venis momento por ekzameni la alternativon, kiun proponas ĝia kontraŭpoluso. Esperanto frontas malfacilaĵojn multrilate spegulajn al tiuj de la angla, kaj estos instrue kompari ilin du. Estus tede kaj, mi esperas, senbezone ĉi tie prezenti la argumentaron por tio, ke oni konsideru esperanton normale funkcianta lingvo kun eksterordinara socia bazo. Haveblas multaj studoj pri tiu temo; por la intereseata leganto, bonan orientilon konsistigas la artikoloj kaj cititaj fontoj en lastatempa aldono al la serio "Trends in Linguistics" (Schubert (red.) 1989). Ĉi tie mi enfokusigos tiujn aspektojn, kiuj rekte tuŝas la nunan temon. Sende-

pende de la sukcesŝancoj de Esperanto, la traktotaj ideoj ŝajnas trafi senpere kaj forte sur la tutan problemaron.

Se la kandidateco de la angla pragmate apelas al ties nuna pozicio, apenaŭ pravigante sin per lingvistikaj rimedoj, Esperanto bazas siajn argumentojn sur principaj demandoj. Ĝiaj du ĉefaj klasikaj tezoj reelvokas la espereman raciismon de la Klerigo, kaj reesprimiĝis multokaze kaj multmaniere tra la centjara historio de la movado. Planita lingvo estas jam pronature pli facile lernebla ol neplanita nacia lingvo; pretendoj por Esperanto gamas de unu kvarono kaj unu dudekono de la tempo bezonata por ekregi "nature" lingvon je ekvivalenta nivelo (Sherwood & Chang 1980). Kaj planita lingvo, se ni supozas ĝin vere aŭtonoma en sia funkciado kaj evoluo, proponas la politikan avantaĝon de neŭtraleco. Ni ekzamenos tiujn pretendojn kaj iliajn konsekvencojn post momento.

La unua grava atendendaĵo, tamen, temas pri la komplete malsamaj terenoj sur kiuj la du lingvoj elektas batali. Esperanto efektive ne povas materie konkuri kun la giganta industriego de "la angla kiel dua lingvo". La plej granda Esperanto-organizaĵo en la mondo, Universala Esperanto-Asocio, havas malpli ol 50 000 membrojn, kaj estas malprobable, ke pli ol dekoblo de tiu nombro aktive parolas la lingvon; la sumo de la eldonaĵoj en unu jaro atingas 250, la nombro de signifaj periodaĵoj proksimume la duonon de tio. Ne konvenas konsideri tiujn ciferojn neglektindaj, ĉar paroli Esperanton oni elektas tute libere, preskaŭ sen iu ajn materia instigo; kiom da homoj atendeble parolus la anglan kiel duan lingvon sub similaj cirkonstancoj? Sed ili signifas, ke la pledantoj por esperanto estas devigataj bazi siajn argumentojn sur potenciaĵoj anstataŭ krudaj realaĵoj, mesaĝo kiu neeviteble trafas nur limigitan kredantaron (vd. ekz. Large 1985, p.197-201).

Ekzistas aliaj, pli subtilaj kialoj por tio, ke Esperanto restis ekster la ĉeffluoj de la eŭropa diskurso dum pli ol jarcento, malgraŭ mirinde klera bazo kultura kaj intelekta. Claude Piron, psikologo en Ĝenevo kaj unu el la ĉefaj nuntempaj ideologoj de la movado, argumentis ke Esperanto vekas profundajn nekonsciajn timojn en multaj unu-lingvuloj: "Kiam oni esploras la psikologiajn reagojn, kiujn

elvokas la vorto "Esperanto", oni povas nur miri pri la nombro de personoj, kiuj ne elportas la ideon, ke tiu lingvo povas esti, kelkrilate, supera al ilia gepatra lingvo. Tiu reago devenas de emo identigi lingvon al persono: mia lingvo estas mia popolo, mia lingvo estas mi; se mia lingvo estas malsupera, mia popolo estas malsupera, kaj mi estas malsupera." (1988, p.9) La plia atentigo de Piron, ke "la lingvaj rilatoj ĉiam estis rilatoj de potenculo al malfortulo", eĥas la sendependajn esplorojn de germana historiisto Ulrich Lins, kiu antaŭnelonge publikigis pene dokumentitan studon pri la suspektoj, malhelpoj kaj konsciaj persekutoj kontraŭ la Esperanto-movado fare de multaj totalismaj reĝimoj, plej notinde en la germana Tria Regno kaj en Sovetunio sub Stalin. Lins vidas similtajn procezojn okazi hodiaŭ, kvankam en malpli drasta formo: "Ŝajnas, ke multaj registaroj ne volas ke Esperanto realigu sian plenan potencialon, ĉar malgraŭ siaj perbuŝaj deklaroj favore al la internacia komunikado ili volas plu difini la kondiĉojn, en kiuj iliaj civitanoj povas ĝui translimajn kontaktojn. Oni povas konsideri kiel progreson la lastatempan aldonon de "la rajto je komunikado" al la listo de la homaj rajtoj... Aliflanke, Unesko ne riskos ofendi la naciajn registarojn per la lingva aspekto de la internacia komunikado, kiuj estas aliaj ol tute ĝeneralaj." (1988, p.531).

Se nun flankenlasi la motivojn, la fundamentaj pretenoj de Esperanto ja ne restis sen atakoj de eŭropaj intelektuloj. Kvankam malmultaj el ili pridubis la relativan facilecon, ekregi Esperanton, multaj verkistoj kiel I.A. Richards kaj George Steiner esprimis suspektemon, ke tiun ŝajnan avantaĝon malfortigas iuj limoj al la esprimopovo, nevenkeblaj por planita lingvo. Se iom simpligi, ilia akuzo egalas al neado de la reala aŭtonomeco de la lingvo, kiun ebligas nur "tempo kaj la propra tero" (Steiner 1975, p.470). Al tiaj verkistoj kutime mankas senpera kono de la leksikografio kaj literaturo de Esperanto, kaj ajna sperto de la parolata lingvo (Verloren van Themaat 1989). Iliajn argumentojn, kiel ajn koherajn kaj elegantajn, dementas la efektivo. Surpriza sed kontrolebla fakto de la interlingvistiko estas tio, ke la nun akceptataj

signifoj aŭ kromsignifoj de Esperanta vorto, aŭ la nuanca uzo de iu morfemo, ofte diferencas de tiuj troveblaj en la norma unulingva vortaro de la lingvo aŭ en la uzado de ĝiaj parolantoj (Piron 1989). Plue, kulturita parolanto de Esperanto havas almenaŭ supraĵan konon de norma originala kaj tradukita verkaro kaj de la baza historio de la lingvo: konon transdonitan per rimedoj formalaj (ekzamenoj), duonformalaj (seminarioj kaj popularigaj verkoj) kaj per interpersonoj kontaktoj. Tiumaniere transdoniĝas aŭtonoma leksika kaj kultura kerno, versaĵne pli kohera ol tiu de multaj pli grandaj sed malpli edukitaj lingvokomunumoj ĉirkaŭ la mondo. Efektive, ĉe la periferio de la lingvo sendube ekzistas interferoj pro kontaktoj kun la denaska etna lingvo de la parolantoj. Tiu tamen senescepte malaperas, kiam la temoj aŭ la parolantoj mem moviĝas centren en la internacia diskurso. Ŝajnas esti neniu principa kialo, ke la sama fenomeno ne funkciu je multe pli granda skalo, se iam Esperanto akceptiĝos kiel ĉefa rimedo por la internacia komunikado, eŭrope aŭ aliloke.

Tamen povas ŝajni ke la ekzisto de tiu sendependa kultura bazo, aŭ "semantiko", almenaŭ parte dementas la duan pretendon de Esperanton, ke ĝi kulture neŭtralas. Efektive, pli ofte aŭdata estas la kritiko, ke ĝiaj plejparte latinidaj vortaro kaj eŭropa socia bazo malkvalifikas Esperanton por la rolo de vera mondlingvo. Se tiu akuzo estus prava, ĝi povus eĉ aldoniĝi al la argumentoj por la eŭropa uzado de Esperanto: Lingvoj ne nur unuigas, sed ankaŭ provizas identecon, kaj komuna eŭropa lingvo malakceptata de la cetera mondo povus gajni plian allogon kaj impeton ene de la kontinentaj limoj. Sed Esperanto, kvazaŭ bedaŭrinde, estas komunikilo multe pli monda ol nure eŭropa. Al tio kontribuas pluraj ĝiaj aspektoj, kies interpreto estis kaj restas tre disputiga en la movado mem.

Leksike kaj historie, Esperanto estas sendube eŭropa. Ja dubindas, ĉu iu alia mondoparto sendepende evoluigis la koncepton de planita interlingvo, dum iu ajn tia aposteriora projekto deziranta tutmondan akcepton estas dev-



igata bazi sin grandparte sur radikoj hindeŭropaj (la hindeŭropaj popoloj konsistigas jam ĉ. duonon de la monda loĝantaro). Tamen je la lingva flanko, tiun eŭropecon kontraŭpezas apriora sintaksa morfologio, tute senanaloga inter hind-eŭropaj lingvoj, kaj je la kultura flanko ĝin kompensas universalisma ideologia bazo. Tiuj du aspektoj fakte interagas en fascina maniero. Jam disvastiĝis la opinio, ke la baza leksiko de Esperanto devus resti kiel eble plej limigita ene de la limoj de klareco kaj esprimopovo, kaj ke la vortokonstrua potencialo de la lingvo meritas maksimuman utiligon. Tiuj opinioj kutime ligiĝas al la principo de "simpleco" aŭ lernfacileco, kaj ofte al eksplicita pledo por la supozataj bezonoj de neeŭropaj parolantoj, por kiuj la vortaro konsistigas pli gravan obstaklon ol por la pli multaj eŭropanoj.

Tio ne volas diri, ke kontraŭa pensfluo ne ekzistis inter la esperantistoj ekde la komenco. Polemikoj pri "neologismoj" - foje vere novaj vortoj, sed pli kutime maloftaj, stile markitaj vortoj por kiuj ekzistas pli "simpla" alternativo - vekis pasion tra la tuta historio de la movado. Grava preskribisma skolo, kiu aŭtoris pionirajn studojn pri la vortokonstruado kaj frazstrukturo en Esperanto (Schubert 1989, p.257-265), sukcesis kodigi la eŭropajn normojn de la lingvo en radikala disiro de la protea Fundamenta Gramatiko. Sed la efiko montriĝis minimuma kaj portempa (Wood 1987). La lingvo ne nur konservis siajn neeŭropajn trajtojn, sed la retoriko de la plej gravaj organizaĵoj kaj personoj en la movado restis obstine tutmondisma. Lastatempa plivigliĝo en la agado ekster Eŭropo, inkluzive de Universalaj Kongresoj en Brazilo kaj Ĉinio, plifortigis tiun tendencon. La haveblaj informoj sugestas, ke granda plimulto de la esperantistoj konsideras sian lingvon tutmonda. Laŭ ilia perspektivo, eventuala kontribuo de Esperanto al la solvo de lingvaj problemoj en Eŭropo, kvankam grava, konsistigas nur unu paŝon al la fina celo. Ne estas klare, ĉu tia ideologio pli aŭ malpli faciligas la akcepton de Esperanto en Eŭropo.

Kiel finan punkton pri la neŭtraleco, oni notu ke Esperanto ne suferas de la daŝgupta paradokso pri dualingva

kreado. Malkiel la angla, kies normojn difinas ĝiaj denaskaj parolantoj, Esperanto ricevas siajn normojn (ĉiukaze malpli rigidajn) el la translingva uzado (Piron 1987, 1989). Sed la praktikaj malfortoj de tia komunumo estas evidentaj. La angla kiel elektita dua lingvo povas malhavi profundajn radikojn, sed la situacia premo tenas ĝin firme en sia loko; Esperanto, malgraŭ siaj teoriaj fortoj, malhavas la avantaĝojn de geografia centro kaj "kaptita" parolantaro. La organizaĵoj kaj edukajn problemojn, la sektecajn tendencojn, kaj la eksternorman membraron rezultantajn el tiu fakto jam adekvate priskribis por la brita movado la sociologo Forster (1982). Skeptikuloj rajtas konkludi, ke Esperanto ankoraŭ ne sukcesis pruvi sian funkcipovon je vere signifa nivelo, kaj ke la tuta demando pri ĝia rolo kiel komuna eŭropa lingvo estas; por diri plej milde, antaŭtempa. Ni do rigardu al tio, kion povus alporti la estonteco.

Kvankam nuntempe larĝe gapas la abismo inter la pozicioj de la angla kaj Esperanto, la elekto inter ili estas tute ne antaŭdestinita. Unuflanke la minoritateco de Esperanto prezentas gravegan obstaklon al ĝia akceptiĝo kiel ĉeflingvo de la internacia komunikado. Aliflanke, kiel ni vidis, ankaŭ la angla frontas severajn politikajn bazojn, kvankam tiuj ĝis nun ne grave limigis ĝian disvastiĝon. Ĉu la estonta evoluo favoros la unuan lingvon aŭ la duan, nek nek aŭ kaj kaj? Tiel longe kiel kreskos la internacia komunikado, plifortiĝos ankaŭ la pozicioj de iuj mondaj lingvoj, sed kunrolas neantaŭvideblaj faktoroj. Multaj nun lernas la japanan, kiuj antaŭ dudeko da jaroj ne eĉ revus pri tia eblo; daŭras la ekonomia plipotenciĝo de Azio. Iom poste ni eble vidos gajnon de influo far la hispanlingvaj landoj, kies lingvo fakte multe pli taŭgas por la internacia komunikado (Tonkin 1986). Tiuj evoluoj rekte tuŝas la lingvosituacion en Eŭropo, simple pro tio ke la angla ne okupas ian privilegion lokon inter la eŭropaj lingvoj; ĝia populareco radikas plejparte en eksteraj faktoroj. Ne dubblas, ke la angla konservos lokon inter la plej gravaj eŭropaj kaj mondaj lingvoj dum la antaŭvidebla estonteco. Sed ĝi ĝuas nenian garantion de ĉiama supereco.

Esperanto, male, okupas jam vere privilegian lokon, kvankam tiu kuntrenas multajn praktikajn malavantaĝojn. Kiel planita internacia lingvo kun reala parolkomunumo ĝi estas senrivala, kaj ŝajnas malprobable, ke aperos pli sukcesa konkuranto (vd. Blanke 1985 kaj ĉi-sube). Ĝia pozicio dependas de la kondiĉoj de la internacia komunikado, sed relative malmulte de la ekonomia kaj politika potencodivido - krom en tio, ke pli egaleca distribuo de potenco rekte favoras la uzon de lingvo apartenanta al neniu aparta grupo. Gajnoj por la politiko de egaleco, eŭrop-kaj mondscale, igas ĉiam pli verŝajne, ke Esperanto havigos al si pli vastan rolon.

Jen efektive la fokuso de la debato. El Eŭropo de la lastaj du jarcentoj venis ne nur la koncepto de egaleco, sed ankaŭ la konstato, ke la egaleco en sociaj rilatoj estas atingebla nur konscie, per planado kaj ne per hazardo. La sociaj movadoj, kiuj penas transformi tiun konstaton en agadon, trovas en Esperanto idealan aliancanon. La angla, laŭ sia naturo, reprezentas la forton de la inercio, de la naturalismo; ne pro tio, ke ĝian uzon monopolas konservativuloj, sed pro tio, ke ĝi malagnoskas la eblon de elekto kaj do neeviteble donas privilegian statuson al iuj individuoj kaj grupoj super aliaj. La naturalismo nur malfacile mortas, efektive, tiel en la eŭropa politiko kiel en la eŭropa kulturo. Sed se ĝi efektive morte malsanas, tiaj viglaj hibridoj de raciismo kaj pragmatismo, kia Esperanto, povos trovi idealajn kreskondiĉojn en ĝia loko.

Eblas imagi aliajn similajn hibridojn. Ĉi-jarcente ekfloris jam du gravaj movadoj por la reformo de la angla, cele al ĝia taŭgigo por internacia rolo. Ambaŭ ĝuis imponan intelektan subtenon (George Bernard Shaw heredigis siajn riĉojn al la reformado de la angla ortografio. I.A. Richards dediĉis siajn konsiderindajn talentojn al la propagando de Basic English); ambaŭ nun komatas. Sed la supre skizitaj konscioŝanĝoj povus revivigi tiajn klopodojn. Pli proksime al la Esperanto-poluso de la spektro, eblas imagi internacian kunlaboron por la adapto aŭ sintezo de ekzistantaj lingvoj, pli proksime al la "Norma Averaĝa Eŭropa Lingvo" ol Esperanto; ankaŭ tion oni

provis kadre de la Internacia Asocio por Helpa Lingvo (1924-1951) kaj ĝia kreaĵo Interlingua (vd. Large 1985, p. 145-155). La fundamenta problemo, kiun frontas tiaj projektoj, estas la vivigo de la rezulto. Kaj Basic English kaj Interlingua spertis limigitan uzadon dum sia plej bona periodo, kaj ambaŭ eventuale plu vivas en tiu senco, ke restas al ili manpleno da parolantoj, sed nek unu nek la alia iel proksimiĝis al la gamo da landoj, sociaj kaj personaj situacioj kaj celoj, en kiuj uziĝas Esperanto. (Blanke 1985, 1989). Oni verkis multon, precipe en Esperanto, pri la kaŭzoj de tiu fakto; sed eble sufiĉas al ni memori, ke la lingvo estas unike kompleksa socia-psika fenomeno, kiun ni neniel komprenas analize, eĉ kiam ni uzas ĝin por verki kaj legi ĉi tiujn vortojn. Por krei lingvon oni bezonas eksterordinaran koincidon de historiaj kaj kulturaj cirkonstancoj, talento, instinkto kaj simpla bonŝanco.

Ne eblas tute ekskludi aliaj solvojn al la problemo de komuna lingvo por Eŭropo, sed la du polusoj difinitaj de Martinet efektive prilumas la problemon. Espereble mi sukcesis montri la ĉefajn trajtojn, kiuj diferencigas la du lingvojn, kaj la faktan, ke la sinkrona supereco de unu eble hodiaŭ kaŝas la diakronan dinamicon de la alia. Evidente ni ne parolas pri mallonga perspektivo, aŭ pri abrupta transiro. Lingvoj ne aperas kaj malaperas ene de kelkaj jaroj; ilia fluso kaj malfluso okazas laŭ la ritmo de generacioj. La angla obeis tiun regulon kaj ĝin obeos ankaŭ Esperanto, malgraŭ ĉiuj siaj planitaj ecoj. La kialoj estas psikaj (radikala koncepto bezonas tempon por iĝi akceptebla al la popola konscio), politikaj (malmultaj politikistoj subtenos ideon, al kiu evidente mankas publika apogo) kaj praktikaj (nur konsideru la malfacilaĵojn en instruado, kiuj sekvas la subitan akcepton de la lingvo). Ĉiuj ĉi faktoroj ligiĝas kun la evoluo de la kultura konscio en Eŭropo kiel tuto. Aŭtomata la procezo ne estas, kaj ankoraŭ ne eblas diri, ĉu ĝi daŭros du generaciojn aŭ dudek. Sed se la grandaj tajdoj de individuismo kaj raciismo, komencintaj sian avancon antaŭ ĉirkaŭ 25 generacioj, plu antaŭenportos la eŭropan konscion, tiam la pesilo de komuna eŭropa lingvo ekkliniĝos for de la hazardoj de la historio,




*al lingvo enkorpiganta la homan potencialon por kreado, elekto kaj libero.*

## KONSULTITAJ VERKOJ

- Blanke, Detlev. "Planned languages - a survey of some of the main problems." En Schubert (red.), 1989, p.63-87.
- . Internationale Plansprachen. Eine Einführung. Berlin: Akademie-verlag, 1985.
- Branegan, Jan. "Bubbling up from below." Time, 21 aŭgusto 1989.
- Chiti-Batelli, Andrea. La politica d'insegnamento delle lingue nella Comunità Europea: stato attuale e prospettive future. Roma: Armando, 1988.
- Dasgupta, Probal. "Sanskrit and Indian English: some linguistic considerations." New Quest 67 (1988), p.15-25.
- Duc Goninaz, Michel (red.). Studies on the International Language. Gent: AIMAV, 1987.
- Forster, Peter G. The Esperanto Movement. Den Haag: Mouton, 1982.
- Hugège, Claude. "Les enjeux de l'internationalisme en matière de langue." En Lo Jacomo (red.) 1986, p. 257-263.
- Knowlson, James R. Universal Language Schemes in England and France 1600-1800. Toronto: University of Toronto Press, 1975.
- Large, Andrew. The Artificial Language Movement. Oxford: Basil Blackwell, 1985.
- Lins, Ulrich. La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto. Gerlingen: Bleicher, 1988.
- . "Marxismus und internationale Sprache." En Duc Goninaz (red.) 1987, p.26-27.
- Lo Jacomo, François (red.). Plurilinguisme et communication. Paris: SELAF, 1986.
- Martinet, André. "The proof of the pudding." En Schubert (red.) 1989, p.3-5.
- Piron, Claude. "A few notes on the evolution of Esperanto." En Schubert (red.) 1989, p. 129-142.

- . Les réactions psychologiques à l'espéranto. Documents sur l'espéranto 25F. Rotterdam: UEA, 1988.
- . "Créativité et expression linguistique." En Duc Goninaz (red.) 1987, p.145-152.
- Price, Glanville. The Languages of Britain. London: Edward Arnold, 1984.
- Schubert, Klaus (red.). Interlinguistics. An Introduction to the Study of Planned Languages. Berlin: Mouton de Gruyter, 1989.
- . "An unplanned development in planned languages." En Schubert (red.) 1989, p.249-274.
- Sherwood, Bruce Arne kaj Chin-Chuan Cheng. "A linguistics course on international communication and constructed languages." Studies in the Linguistic Sciences 10 (1980), p.192.
- Steiner, George. After Babel. Oxford University Press, 1975.
- Tonkin, Humphrey. "Technology and the language barrier." En Lo Jacomo (red.) 1986, p.21-27.
- Van de Sandt, Udo. Raporto en Initiative Media News Bulletin (januaro 1989). London: Lintas Worldwide.
- Verloren van Themaat, W.A. "Esperanto literature and its reception outside the Esperanto movement." Babel 35 (1989), p. 21-39.
- Wood, Richard E. "The development of standard phonology in Esperanto." En Duc Goninaz (red.) 1987, p.58-76.
- . "A voluntary non-ethnic, non-territorial speech community." En William Francis Mackey kaj Jacob Ornstein (red.). Sociolinguistic Studies in Languages Contact: Methods and Cases. Den Haag: Mouton, 1979, pp. 433-450.



## UNU LINGVO POR ĈIUJ

Sekve al la debato *Pri ŝanĝoj en la lingvo* (L!92), mi diras unue, ke mi tute konsentas kun Garolo, Suzanne, Nicole D., Oksana (almenaŭ unufoje!) kaj mia malnova amiko Leereveld ; kaj mi ne konsentas kun J.C., Janseb kaj Patriko. Nun mi ŝatus aldoni kelkajn komentojn pri la vorttrezoro.

La propono de Patriko pliinternaciigi Esperanton verdire estas pli eŭropigi ĝin. La eŭropaj lingvoj konsistigas apenaŭ kvaronon el la lingvoj parolataj en la mondo. Pensu pri la afrikaj, arabaj, aziaj, ĉinaj lingvoj ktp : ili havas nenian rilaton kun la eŭropaj lingvoj. Se Patriko havus ideon pri ia ajn azia lingvo ekzemple, li sciis ke tiu internaciigo, latinigo, tute ne valoras. Liaj projektoj iamaniere similas al Ido, Esperantido, Occidental, ktp, ne plu temas pri Esperanto.

Pri la vortriĉeco de la lingvoj kaj precipe de Esperanto.

D-ro Zamenhof kreis Esperanton kun iom pli ol 1000 radiokoj, kiuj estas ĉiuj en la "**Fundamento de Esperanto**". Sed ti neniam intencis limigi la nombron da vortoj. Male en "**Lingvaj Respondoj**" p.33-37 li diras prave, ke estas la tasko de specialistoj krei sciencajn kaj teknikajn vortojn, kaj li klarigas kial. Kaj ĝuste tio okazis por la redaktado de P.I.V. Mi mem iomete helpis. Kiam mi biciklis al Stokholma Kongreso en 1951, mi haltis en Kopenhago por renkonti D-ron Neergaard, kiu estis ŝargata prepari la botanikan kaj agrikulturan terminaron en P.I.V. Ĉar mi jam laboris de pli ol 3 jaroj en Madagaskaro, li petis min listigi la nomojn de la plej ordinaraj tieaj plantoj : botanikajn nomojn, francajn kaj anglajn nomojn kiam mi konis ilin. Mi faris tion kaj-sendis al li liston. Li same petis korespondanton en Brazilio, kaj eble en aliaj landoj. Kompreneble, ĉar Esperanto estas tutmonda lingvo, necesas havi vortojn por priskribi ĉion, kio ĉirkaŭas la homojn de Norda ĝis Suda Poluso, ne nur Eŭropanojn. Se Afrikanoj, Azianoj, ktp, ne havas vortojn por plantoj, animaloj, ktp, estus tre granda manko por tutmonda

### BRŬŬUROJ DISPONIBLĀJ ĈE SAT-BRŬŬURSERVO

Adreso : Cercle amical esperantiste F-47470 BEAUVILLE  
Pĕk: 3371 74M Bordeaux, samadrese

Mendkodo. Titoloj (Aŭtoroj)	Prezo en FF *
Aa. La antaŭvenantoj de Anarkiismo (Armand)	4
AA. La Apero de Ahasvero (Han Riner)	25
AL. Alvekoj al la homa konscienco (APJR)	10
AN. Nia angorprena socio (Milan Simeĉka)	3
AP. Amo per proverboj (Azevedo)	1,50
AT. Kiel mi estas ateisto (A.Lorujot, tr. Valo)	2,50
AU. Al unu lingvo por Eŭropo? (Fettes)	5
BA. Bazoj de Anarkiismo (Balikanski)	25
BP. Legendo pri la bela Pekopeno (V.Hugo)	15
BU. La racia kaj ateista budhismo	5
CI. Ekologio : Ĉu ideologio? (W. Gunther)	3
CM. Civila Malobeemo (H.D.Thoreau)	10
CS. Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio? (Lanti)	6
DI. Kiel diri...? (Lentaigne), E-frazeologio	25
EB. Esperanto de Base (10 ekz-roj unuolita)	5
EL. Elektro de tekstoj de Bakunin	10
ES. Por ekologia socio (Murray Bookchin)	15
ET. Etiko I (Kropotkin)	15
EV. Eduko kaj vivŝanĝito (Krishnamurti)	5
FA. Konstrui fajron (Jack London) novelo	5
FE. Esperinaro France-Esperanta (Bourgeois)	45
FF. La Forto de la Fortaj (Jack London)	5
FL. La fluo de la Interparolo (Bourgeois) Esp./Fr.	10
FP. Faux amis - Faux parents et "étrangers"	15
FV. Fronte al la vivo k.a. tekstoj (Krishnamurti)	15
FZ. Filozofio Zoologia (Lamarck)	20
GE. Abregé Grammaire & Esp-o (Lentaigne), 2 partoj	15
HO. La Evangelio de la Horo (Berthelot)	10
IE. Initation à l'Espéranto (An Kaŭ)	5
IM. Individuista Manlibreto (Han Riner)	5
IN. Individualisma socialismo de A.R. Protchowsky	2
JA. Jaro 2000 (H.Muller) disdona ekonomio	35
KA. Kancero kaj Ekologio (Maurice Touchais)	2
KB. Kie brulas ĝentlemanoj? (poemaro) Buchowski	18
KE. La Kvin Evangelio (Han Riner)	15
KI. El la kara infaneco... (Valo)	20
KP. Katestroplano pri Fessenheim + Why!	5
LEK. La eta kato kiu ne volis morti (por infanoj)	5
LA. Lingvaj anguloj (Baromet)	20

\* Afranko inkludita ekde 120-franka mendo. Listo de aprilo 1991.

LK. La Konflikto (Le Dantek) + Dubi (Alain) tr.Lanti	20
LL. Leteroj de Lanti (ĝis 1937)	45
LM. La Mondo ne havas atendejon (Dekker)	15
LN. Linguistike et non-violence (H.Masson)	3
LR. La Ribelo (Joseph Roth) romano	18
ME. La Mistero de nia surtera vivo (Archdeacon)	25
MN. Ĉu militista defendo estas kredinda? (Lasserre)	6
MS. Memvoja Servuto (La Boetie)	5
MV. Mia vivo. Artikolaro. Poemaro (Bartelmes)	10
NC. Naciismo (Lanti)	12
NI. Nia Individuismo (E. Arriandi)	5
NL. Naturo, pensoligo, morala lego (Leo Polak)	3
NO. Nova Paradigmo en Psikologio (Feldman)	35
PA. Pensoj de PASKALO (ekstraktaj)	15
PF. Proverbaro France/Esp. (Bourgeois)	20
PI. Esperanto kaj Literatura (R.Laval)	3
PN. Politika Nefortoro (M.A.N.)	8
PR. La Poemo de Rodano (Frederi. Mistral)	30
PS. Psikotransformismo (Ergoto de Bonero)	4
RA. Revolucia registaro. Pariza Komunio (Kropotkin)	4
RO. Rompoj (A.Jacquard)	4
SA. Kio estas SAT?	4
SE. Semnaciece tra nia mondo (G.R.Ledon)	60
SR. Les 16 regles commentées (R.Laval)	3
SS. Sindikatismo. Sovetoj (A.Pannekoek)	5
SG. La Ŝtona Gastro (Michel Duc Gonhaz) (teatraĵo)	5
TC. Por-tutmonda civitismo (A.Gaymarat-Rollet)	20
TD. Tiel diri! (Lentaigne) supl. de DI por francoj	25
TM. Tra la mondo per biciklo kaj esp. (Pétraire)	20
TP. La Turo de l' Popoloj (Han Riner) romano	20
US. Unueco super prokreda dividiĝo (Leo Polak)	3
VH. Ĉu ni vere helpas la trian mondor? (Roberts)	15
VLI. Verkoi de Lanti L. (for la Neŭtralismon)	
La Laborista Esperantismo. Absolutismo.	
Herzulo. Herezaĵo. Adamaĵoj (disp. dec. 1991)	35
VL2. Verkoi de Lanti 2. (3 semajnoj en Rusio	
Tfo Plena Gramatiko, Diskutoj, Epitogo)	
VL3. Verkoi de Lanti 3. (Artikoloj, paroladoj kaj	20
ekstraktaj el leteroj de 1937 ĝis 1946)	
VO. Vortoj de Kamrardo E. Lanti	20
VT. El verkoi de Leo Tolstoj (Patriotismo kaj	
registaro, Al politikistoj, Ĥodinka, Ne mortigu!)	
ZH. La Zamenhofa Homaranismo (A. Caube)	7



lingvo. Dum, se mankas vortoj kiel : olda, pigra, ktp, ne gravas, ĉar ni havas prefiksojn **mal**, **ne**, **sen** por esprimi malon, neadon kaj mankon. Ĝis nun mi parolis pri ordinaraj, ĉiutagaj vortoj : fruktoj, legomoj, animaloj. Por sennaciistoj Esperanto fariĝos la tutmonda lingvo estonte, do estas memkompreneble, ke ĝi fariĝu tre riĉa. Por naciistoj Esperanto estas nur helplingvo kaj tiel tiuj homoj povus diri : ni ne bezonas la plej sciencajn kaj teknikajn vortojn. Malprave, ĉar helplingvo devas helpi ĉiujn, do povi esti uzata okaze de teknikaj diskutoj dum kongresoj, simpozioj. Aliel oni bezonas uzi nacian lingvon kiel nun la anglan.

Do Zamenhof ne povis krei ĉiujn vortojn. Multaj sciencoj aperis dum la lastaj jaroj post lia morto, kaj pli kaj pli da fakotermoj aperos laŭ la disvolvigo de la sciencoj kaj fakoj, ja Esperanto pliriĉiĝos tute nature. En la naciaj lingvoj la nombro da vortoj estas multe pli grava. Ekzemple, en la franca, la simpla "**Petit Larousse**", eldono 1987, entenas 77 000 vortojn. La "**Grand Dictionnaire Larousse**" en 15 volumoj eldonataj inter 1982 kaj 1985, entenas pli ol 190 000 vortojn. La angla lingvo estas multe pli riĉa, ĉar pli disvastiĝita. Tiuj verkoj entenas geografiajn, historiajn vortojn, biografiojn, ktp, por eble la duono de la vortoj. Kompreneble, neniu konas ĉiujn vortojn de tiuj lingvoj, sed ili ekzistas kaj estas haveblaj al ĉiuj laŭ iliaj bezonoj. Eĉ afero kiel juro, kiu ne estas scienca, bezonas fakan terminaron, same por la diversaj artoj, sportoj, ktp.

Nun la disvastiĝo de Esperanto estas embria. Ĉu estas 100 000 kapablaj esperantistoj? Sed iam, eble la tutmonda loĝantaro uzos Esperanton. La geknaboj lernos ekde la unuagrada lernejo ĝis la universitato esperante, tiam ili lernos ĉiujn temojn en tiu lingvo. Parenteze, se ni esperantistoj ĝenerale ne uzas Esperanton por kalkuli, tio estas pro tio ke ni ne lernis multipliktabelon esperante. Tiam, estos tute alia afero. Necesos sekvi disciplinon, kaj la rolo de Akademio estos tre grava. Tio trudos la aplikon de la reguloj difinitaj en la Fundamento, ne la fantazion de ĉiuj. La sciopovo de la lingvo multe superos la konojn de averaĝa esperantisto nuna. La tiamaj homoj scipopos, mastros la lingvon, novaj vortoj aperos, aliaj kadukiĝos.

#### Miaj spertoj kun la angla lingvo :

Kiam mi eliris el metilernejo en 1939, mi estis logata de la angla lingvo kaj ekstudis ĝin per mi mem. En 1946 mi komencis kapabli legi libron sufiĉe flue, kaj mi daŭrigis mian studadon. Fakte, tio estis bona ideo, tio multe utilis al mi poste. Mi kariervis en tropika agrikulturo kaj interesiĝis pri botaniko inter aliaj sciencoj. Laboris ĉefe en tiuj temoj la nederlandanoj, multaj anglaparolantoj kaj francoj. Konsekvence, tiuj kiuj volis progresi nepre bezonis la anglan lingvon, ĉar ne estis publikigaĵoj en Esperanto kaj tre malmulte en la franca. Kompreneble, mi ne povis lerni nur la fakan terminaron, tial mi lernis eble 10 000 vortojn, aŭ pli, por scipovi legi tiun lingvon sen tro da malfacilaĵoj. Nun mi kapablas legi flue tiel bone sciencajn kaj fakajn librojn kiel modernajn romanojn. Cetere, estas granda avantaĝo, ĉar estas tiom multe da libroj je ĉiu nivelo, eĉ por instruiĝi pri novaj sciencoj aŭ fakoj. Aliflanke mi kvazaŭ nenion komprenas kiam mi aŭdas teatraĵon aŭ filmon ĉe televido. Mi kapablas diskuti kun angloparolanto, sed tiam mi petas lin paroli klare kaj malrapide, eventuale rediri tion kion mi ne komprenis. Kompreneble tio ne necesas kiam mi parolas kun eksterlandano : li parolas same kiel mi. Sed dum kongreso mi ne povas fari same, tial mi ne komprenas. Mi ne estas sola : mi vidis francajn profesorojn ne kapablajn pridemandi, ĉar ili ne komprenis kion la parolanto diris. Ĉefe vespere, oni estas lacega. Mi tamen kapablas paroladi, instrui teknikon en tiu lingvo. Ĉe la komenco mi pensis : Eble ili ne komprenos mian fuŝan prononcon. Feliĉe ili komprenis min, pri tio mi estas certa pro la demandoj, kiujn ili faris poste.

Scipovi legi kaj skribi la anglan estas laborego, sed kapabli kompreni ĝin parole postulas almenaŭ 5-jaran restadon en lando, kie la angla estas parolata.

#### Konklude :

La supereco kaj facileco de Esperanto estas okulfrapaj. Oni tamen ne povas esperi mastri lingvon en 6 monatoj, tio estas iluzio, same kiel lingvon kun 1000 radikoj. Laŭ miaj konoj, eĉ la plej primitiva lingvo hodiaŭ uzata entenas almenaŭ 3000 vortojn. Lingvostudado ne estas ludo, tio estas laborego.



Ĉu Esperanto fariĝos tutmonda lingvo en malproksima estonteco, mi ne scias, mi ne povas diveni. Sed mi opinias, ke Esperanto havas atutojn. Esperanto ekzistas jam de pli ol 100 jaroj, ĝi estas flue parolata de multaj anoj, estas jam grava biblioteko, kaj ĉefe ni havas P.I.V. Pro mia malproksimeco de la grandaj centroj mi ne estas certa, sed mi supozas, ke nenia internacia lingvo prezentas tiom da avantaĝoj nun. Ni ne malesperu pri estonteco.

J. DEKER

### KONTRIBUO AL DEBATO PRI ORIENTAJ OKAZAĴOJ

S-ino Oksana vigle prezentas sian vidpunkton pri Ukrainio. Ŝi reagas al vidpunktoj de Igorj kaj R. Meurant. Ŝi estas ukraina naciistino, deziras ukrainan ŝtaton. Por tio ŝi donas multajn argumentojn. Ĉiam eblas trovi bonajn pretekstojn por defendi propran opinion. Ŝi apogas ankaŭ naciismajn korsikanojn, vaskojn, katalunojn, ktp, kaj deziras por ili proprajn ŝtatojn. Tiel ŝi revas dispecigi planedojn en etajn naciojn.

Mi preferus, ke oni uzu la vorton "nacio" nur laŭ la tria difino en P.I.V. kaj ne kiam oni parolas pri etnoj. "Nacio : jura persono konsistanta el la tuto de la individuoj regataj de unu sama konstitucio kaj distingita disde ili". Do, nacio povas konsisti el individuoj el pluraj etnoj. Mi estimas "perestrojkon" penado por eliri el stato, en kiu estis nacioj de Sovetio. Do estus preferinde helpi por ĝia sukceso, ol postuli apartigon de U.S.S.R. Forigi la barilojn ne signifas: "rezignu pri via originalo, iĝu mia ombro, iĝu dua mi", sed nur faciligi la rilatojn, vivi en bonaj harmonio kaj solidaro, organizi interŝanĝojn en reciprokaj avantaĝoj. Idealo estus iri ĝis Tutmonda Unuiĝo, en kiu eta vilaĝo povus vivi en paco kaj sekureco garantiata de tutmonda instanco. Tiel ĉiuj povus pli bone okupiĝi por pli da komforto, pli da ekipaĵaro. Sinteno egoisme naciista malhelpas por atingi tiun celon.

Estonoj, latvoj, litovoj, ktp, manifestaciis en Londono. Ĉu tiu unueca fronto plu daŭros post akiro de sendependeco? Por ke ĝi plu daŭru, necesos ke ili facile interkonsentu

pri la rilatoj, kiujn devige ili bezonos. Ĉu ne necesos instanco, kiu respektigos la interkonsenton? Ĉu ne estas preferinde modifi la jam ekzistantajn instancojn, por ke ili fariĝu pli liberalaj, ke ili respektu la apartajn kulturojn, morojn, ebligu pli bonan ekonomian mastrumadon?

Igorj prave timas renaskon de kontestado pri landlimoj. Ĉu li pravas? Ĉu jam ne okazas konfliktoj inter Azerbajĝanoj kaj Armenoj? Ĉu en Georgio, Moldavio, oni ne subpremas malgrandajn etnoj? Eble imperio estis frukto de maljustaj, malhumanaj konkeroj (se oni serĉas en historio, estas facile trovi motivojn de malamo inter la popoloj), sed ĉu ne estus pli bone konsideri, kiel hodiaŭ eblas kunvivi pace kaj sekure? Kiel eblas pli bone uzi la akiritajn sciojn, la modernajn ilojn, la planedajn resursojn por la bono de ĉiuj?

Kompreneble, ke ukrainaj naciistoj malamas kunlaborantojn al USSR. Verŝajne, dum la revolucio unuigis la homojn idealo de komunismo, de nova sociordo, kiu estis pli forta ol nacia sento, idealo de unuiĝo de ĉiuj homoj, ankoraŭ pli de du tiom proksimaj, kiel Ukrainio kaj Rusio. Eble ili ne agis bone, uzis fimetodojn, ne sciis bone organizi novan sociordon. Oni povas kondamni ilian agadon sen kondamni la ideon de unuiĝo de popoloj. Nur per unuiĝo, kunlaboro, solidaro, paco estos certigata.

Anstataŭ deziri, ke "Soveta Imperio disfalu ajnakoste", mi preferus, ke ĝi evoluu, ke la konsistigaj popoloj unuiĝu, ke la povo fariĝu vere soveta (regado de la popolo per la popolo, povo demokrate elektita), ke ĝi fariĝu lando de libero, de ekonomia prospero, de sociala justeco.

Ukrainio ne volas atombombojn, sed kiam suvereneco estos akirita, kiu povas garanti kiel ĝi disvolviĝos? Suverena nacio bezonas defendon, naciistoj volas pli da armiloj, pli modernajn armilojn. Najbaraj nacioj agas same, kaj tiel paco estas endanĝerigata. Certe dezirinde estas, ke "Moskvo ne estu tria Romo", sed nur unu el la konsistigaj popoloj de la unuiĝo.

Mi ne estas unu el tiuj, kiuj volas forigi ĉiujn ŝtatojn. Necesas institucio por administri la landon, funkciigi la servojn, respektigi la leĝojn. Sed pli kaj pli ĉiuj planedaj partoj interdependas. Ĉu ne necesas, ke ili submetiĝal internacia juro, al kunordiga laboro demokrate decidita, unue en



grandaj homgrupoj, poste internacie? Plena sendependeco estas nur bela revo. La postulo de suverena ŝtato ofte estas postulo de lokaj regantoj, ambiciuloj, kiuj deziras fariĝi ankoraŭ pli gravaj, pli potencaj. Gravas ankaŭ kia estas la socia strukturo, ĉu regado estas afero de favorata klaso aŭ klano. Eĉ malantaŭ demokratio estas ĝi, kiu fakte regas. Se la granda amaso estus sufiĉe klera por konscie apliki sian elekto-raĵton, estus malpli egoisme naciista, ĝi malpermesus, ke oni bataligu unu kontraŭ alian. Ĉu ne estus dezirinde, ke ĉiuj popoloj interhelpu, kunlaboru, estu pli solidaraĵ? Tiel ĉiu individuo havus pli da sekureco kaj bonstato.

Pri la lingvo : nature ĉiu deziras paroli kaj kompreni en sia loka lingvo. Tamen, granda homgrupo kun multaj dialektoj bezonas elekti kiun lingvon ĝi uzos por la interrilatoj. Kiel okcitano mi ne suferas, ke nun oni parolas nur la francan, tio estas afero de kutimo. Kiel esperantisto mi deziras, ke por la tutplanedaj rilatoj oni elektu Esperanton.

En Sovetio mi deziras evoluon, kiu donu al ĉiuj popoloj pli da kontentigoj kaj pacon.

O.P.

### El letero de Marie Bartovská :

"Ofte vi skribas pri fanatikeco de kredantoj, sed neniam pri la fanatikeco de ateistoj. Ĉu vi vere ne scias, kion ili kapablas fari? Kion faris Hitler kaj Stalin? Kiom da pastroj, gemonafioj estis enkarcerigitaj kaj torturitaj nur pro sia kredo? Oni persekutis ankaŭ ordinarajn kredantojn. Nia instruistino, pli klera ol aliaj instruistoj, devis forlasi sian laboron en lernejo kaj labori en fabriko nur pro tio, ke iu vidis ŝin iri en preĝejon. Da tiaj "etaĵ" eventoj estis centoj.

Ĉu vi ne aŭdis pri la pola pastro Popieluszko (Popjeluŝko), kiun policistoj kruele murdis? Ankaŭ li ne estis sola. En Slovakio venis uloj en paroĥestrejon, la pastron ligis al hejtulo kaj per tranĉilo murdis lin. En Bratislava oni murdis inĝenieron-pastron. Al alia pastro oni aranĝis "miraklon" (krucio "sin" movis) por povi lin aresti kaj ĝismorte torturi. En proksima urbo juna pastro komencis organizadi por junularo ekskursojn kaj aliajn amuzojn por ŝirmi ilin kontraŭ alkoholo kaj similaj danĝeroj. Pro tio oni prenis de li la permeson deŝori kiel pastro. Ktp., ktp. Tamen ateistoj ne estas fanatikaj, ĉu?"

### ETNAJ LIBEREKOJ

Respondo al Oksana (L! 93)

Ke ĉiu etno tute libere vivu laŭvole, kompreneble tio estas dezirinda.

Ke ĉiu etno povu libere, pace, vivi en sia propra ŝtatlando, ankaŭ tio estus bona. Sed ĉu tio povus okazi sen konflikto, en plena akordo kun ĉiuj? Ĉu tio ĉie eblas?

La unua malfacilaĵo estas scii, ĉu ĉiuj, almenaŭ la plimulto el la loĝantoj, konsentos.

La dua malfacilaĵo estas difino de landlimoj kontentigaj por ĉiuj. Bedaŭrinde niaj prapatroj ĉiam militis, konkeris teritorion, foriris, denove foriris. Aliparte, ĉu pro malsato, ĉu pro epidemioj, rabadoj, ktp, popoloj forlasis siajn regionojn por pli bone travivadi aliloke. Plie, kelkfoje, popoloj estis deportitaj. Do, sama teritorio povas esti prave postulata de pluraj etnoj laŭ la epoko, kiun oni konsideras. Oksana asertas ke la Sovetia Imperio povas esti pace malmuntita. Do, mi notas. En Sovetio ĉiu respubliko estas precize limdifinita, sed ĉu tiuj landlimoj vere kongruas kun la diversaj etnoj?

La francaj landlimoj estas tiom arbitre starigitaj, kiom ĉiuj aliaj. Nur Korsiko posedas nepridubebajn limojn. Oksana substrekas la fakton, ke vaskoj kaj katalunoj estas dividitaj inter francaj kaj hispanaj civitanoj. Pro tio ŝi simpatias kaj deziras al ili akiron de propraj ŝtatoj. Sed kial forgesi Flandrion, dividita inter Francio kaj Belgio, kiu ankaŭ havas apartan lingvon kaj kulturon? Kaj kion diri pri Savojo, franca nur de iom pli ol cent jaroj, kiu iam etendiĝis sur parteto de Italio kaj Svisio. Ĉiuj tiuj popoloj, kaj multnombraj anoj de aliaj provincoj (Normandio, iam angla, Delfinio kaj Provenco antaŭe liberaj nacioj, ktp.) estas nun francaj civitanoj, ne Francoj. Oksana substrekas tiun diferencon.

Ĉu tio signifas, ke krom tiuj diversetnaj nacioj ekzistas ankaŭ franca etno (kiu subpremas ilin)? Kie situas la teritorio de tiu etno? Ĉu en la Pariza Regiono? Ĉu bone scias ke la plimulto de la parizanoj estas ĉu provincaj, ĉu filoj de provincaj venintaj en Parizo pro laboro. En Parizo



staras ankaŭ la registaro. Sed preskaŭ ĉiuj registaranoj aŭ administrantaranoj estas provincanoj (strange, plej ofte oni trovas inter ili korsikanojn kaj bretonojn). Ĉu tiuj estas "kunlaborantoj kaj lakeoj" de la subpremata franca nacio?

Norde de Parizo estas eta teritorio, kies nomo estas Franca Lando (Pays de France). Tie sidas la internacia flughaveno de Roissy-en-France. Tiu regiono estis tre ŝatataj de la Frankoj (kiuj donis la nomon al Francio), kaj ili amase instaligis ĉi tie. Do eble ni trovos ĉi tie tiun subpremantan etnon. Sed ĉu tiu teritorio estas vere ilia? Ne, ĉar ili estis invadintoj. Do ili reiru al la regiono, de kie ili venas! Sed ĉu la nuntempaj loĝantoj estas idoj de tiuj konkerintoj? Ĉi tie senĉese okazis militoj, ekstermadoj, malsatego, epidemioj, rabadoj. Multnombraj forfuĝis, aliaj intermiksiĝis kun diversaj etnoj, aliaj nacioj eniris, ktp. Mi dubas ĉu eĉ unu "Francon" mi trovos ĉi tie. Ĉar la Frankoj trairis Belgion antaŭ ol alveni ĉi tie, eble estas pli da "francoj" en Belgio ol en Francio.

Por ĉiu provincano, kiu deziras aŭtonomecon aŭ sendependecon, la Francoj estas ĉiuj aliaj. Por Korsikanoj aŭ Alzacanoj, francoj estas aŭvernianoj, burĝonoj, normandoj, kiel ne bretonoj aŭ katalunoj, kaj inverse? Eble oni povas doni tiun nomon "fremda" al tiuj, kiuj apartenas al neniu etno, t.e. tiuj, kies gepatroj aŭ geavoj devenas de diversaj provincoj, aŭ eĉ de diversaj eksterlandoj. Ili estas la plimulto el la francaj civitanoj. Se oni dispartigas la landon en etnajn ŝtatojn, ĉu ili estos ĉie eksterlandanoj? Same por la ciganoj.

Aliparte, la landlima problemo ŝajnas al mi nesolvebla. Ĝis kie etendiĝas provinco, de kie komenciĝas la alia?

Ĉu ni komparu Francion kaj Sovetion? Pri Sovetunio parolu tiuj, kiuj bone konas la situacion en tiu lando, kun intereso mi legos iliajn informojn. Tion faras Oksana, kaj mi multege dankas ŝin pro tio.

Ĉi tie, en Francio, laŭ mi (aliuloj povas havi alian vidpunkton) oni ne povas diri, ke iu nacio subpremas aliajn. Nur estas homoj, kiuj deziras sendependecon de siaj provin-

coj, kaj aliaj, kiuj preferas esti ligitaj kune en pli granda ŝtato. Sed la registaro kaj la grandaj administracioj loĝas en Parizo kaj ĉiu provinco opinias, ke ĝiaj problemoj ne estas sufiĉe atente zorgataj. Sed estas alia problemoj...

En ĉiu provinco estas riĉuloj kaj almozeptantoj, kaj inter ili oni trovas ĉiugradajn situaciojn. Diskriminacion mi ne vidas inter provincoj, sed inter riĉuloj kaj malriĉuloj. Ekzemple, la idoj de malriĉuloj multe pli malfacile povas akiri bonan edukadon, instruon, same pri valoraj postenoj, same por eniri la artan, intelektan vivon, ktp. Alia ekzemplo: kiam nenion havanta senlaborulo ricevas monhelpon, tion oni konsideras kiel hontindan almozon. Kiam firmaoestro ricevas finanĉan helpon, por ke li dungu laboristojn (je sia profito, kompreneble), oni gratulas lin. Sed tio estas alia afero...

\*

Ĉu propra ŝtato permesas konservi propran originalecon? Ĉu paroli sian propran lingvon kaj instrui siajn infanojn per tiu lingvo permesas daŭrigi sian propran kulturon kaj vivi laŭ tiu kulturo? Eble. Sed plej ofte al iu problemoj estas nur unu taŭga solvo, sama por ĉiuj, kia ajn estas la lingvo per kiu oni cerbumis kaj trovis solvon. En la ekonomia, industria vivo, pro internacia konkurenco oni serĉas la plej efikan manieron labori. Pli kaj pli oni uzas modernajn teknikojn tute similajn. Vojaĝoj kaj televido permesas vidi kiamaniere vivas alilandanoj, kaj instigas imiti ilin. Oni konstruas same. Same oni sin vestas. Tio ne pro iu ajn subpremo, sed pro la nuntempa, moderna vivo.

Tion oni ŝatas aŭ ne. Mi tute ne ŝatas unuformecon (des malpli kiam tiu unuforma tutmonda disvolviĝo ne kongruas mia deziro). Sed nuntempe la ĉefaj diferencoj, kiujn oni povas vidi, estas inter riĉaj kaj malriĉaj landoj, kaj inter ŝtatoj pli-malpli demokrataj kaj ŝtatoj tute aŭtoritataj aŭ integristaj. Se ĉiuj landoj estus riĉaj kaj tute demokrataj, tre certe ilia praktika, ekonomia, ĉiutaga vivmaniero tute similiĝus. Ĉu tiun unuformecon oni devus bedaŭri?

Pri la intelekta, arta vivo, tio ne rilatas al la etna libereco, sed al la individua libereco. Se iu etna ŝtato reguligus la intelektan kaj artan vivon, tio estus neado de individua libereco. Ĉu liberaj intelektuloj daŭrigos la prapatran kultu-



ron? Eble.

Restas la interna politika vivo. Jes, landlimoj protektas ĝin. Tio signifas, ke principe landlimoj protektas demokratian reĝimon de iu lando kontraŭ la najbaro... se tiu ĉi bonvolas respekti tiujn landlimojn. Sed ankaŭ, inverse, ili protektas despotan reĝimon; tiamaniere tirano povas tute libere subpremi, eĉ buĉi sian popolon. Ne necesas nombri tiajn ŝtatlandojn, ili estas tro multnombraj. Ili protektas ankaŭ inter-etnajn militojn, kiel ekzemple en Liberio, kie tute libere tri etnoj interbuĉadis. Tiel, pro granda respekto al landlimoj multnombraj junaj infanoj mortis, kiuj eĉ ne sciis al kiu etno ili apartenas. Ĉar kutime demokrataj landoj pli respektas landlimojn ol diktatorecaj landoj, finfine landlimoj pli protektas aŭtoritatajn landojn ol demokratajn.

Renée Meurant

#### Letero de François Degoul :

"Dankon pro la rapida apero de mia kontribuo en Laŭte 93, p.35. Bedaŭrinde vi malbone legis mian vorton **pensemis**, kiu strange fariĝis en la tria alineo "**plu semis**". Kulpas ankaŭ mia skribmaniero, ĉefe la formo de mia "N". Tiu fuŝaĵo certe ne helpis al kompreno de mia penso.

Tial mi deziras rediri al la legantoj, ke, se sufero ofte instigas al akuzi aŭ nei Dion, male, ĝuo instigas min al danki. Ĉar mi ne estas masofisma, tiun deziron danki mi ne kontraŭbatalas. Preĝo estas do por mi agrabla okupo.

Ĉu iluzio? Kvankam mi ne plu kredas al kristanaj "dogmoj", strange kreskis mia kredo al Dio kaj mia intereso al homoj, kiuj diris, ke Dio al ili parolis: Jesuo, Mahometo kaj aliaj.

Iam iu profesoro tiel resumis la metafizikan penson de Kartezio: "mi pensas, do Dio estas". Pli draste mi konkludas "mi ĝuas, do Dio estas". Sed pli gravas ol tiu kredo la batalo por ke ĉiuj homoj ne plu suferu sed ĝuu."

La kroniko de R.A.C.

#### Tabuoj, malamo kaj aliaĵoj

Dufoje Myong-son vizitis mian hejmon ĉi-vintre. Dufoje 15 tagojn. Interkonsento inter Japanio kaj Koreio limigas la restadojn de koreaj turistoj je 15 tagoj. Por plilongigi sian restadon ŝi bezonus oficialan invitleteron kun la kialo de sia vizito, ekzemple studi la japanan lingvon. Mi ne sukcesis akiri invitleteron por ŝi kaj tiurilate Esperanto-organizaĵoj ne pli utilis ol la francaj institutoj kie mi laboras. Cetere, francaj turistoj rajtas resti 3 monatojn en Japanio. Ĉu diskriminacio?

Tiuj mallongaj restadoj ĉe mi estas des pli bedaŭrindaj ke Myong-son kiel studentino ferias ĉirkaŭ 11 semajnojn vintre, samlonge somere. Kial koreaj studentoj ĝuas tiom longajn feriojn? Ĉar dum ili ferias, ili ne manifestacias... De tempo al tempo, mi spektas bildojn ĉe mia televido de koreaj studentoj batalantaj kontraŭ soldatoj (tiuj lastaj estas ofte studentoj, kiuj ĉesigas la studadon dum 30 monatoj por devige soldatservi). Iam mi rakontis al M-S mian dizerton de la franca armeo kaj ties konsekvencojn. Miajn dirojn ŝi transdonis al sia frato, kiu ĝuste nuntempe kontraŭvole soldatservas. Ĉu li kredis min, estas dubinde...

Eble pro sia juna aĝo, M-s rapide lernas la okcidentajn pensmanieron kaj sintenon. Ĉu studado de eŭropaj lingvoj kaj kulturoj, kaj ĉiutaga kontaktiĝo (tamen tre limigita kaj surfaĉa) kun eŭropaj profesoroj tre influas ŝin? Laŭ mi, tute ne! Oni alproprigas al si tion, kion oni spertas, ne tion kion oni legas kaj aŭdas.

Vivinte en Koreio, mi ofte miris pri la naivaj demandoj kaj kredoj de gestudentoj. Iam, studentinoj demandis al mi kial francaj edzoj batas sian edzinon. Tiu kredo parte devenis de intervjuo de korea aktorino (?) kiu spertis en Parizo kompatindan najbaran edzinon. Tre ofte M-s raportas al mi klaĉojn, kiujn ŝi aŭdas de siaj samklasanoj.

Iam, dum sia unua restado ĉe mi, M-s malhavis pur-



ajn ĉemizojn kaj pretis surmeti malpuran. Mi tuj proponis al ŝi unu mian, sed tion ŝi energie kontraŭstaris, klarigante ke ino ne povas surmeti viran veston en ŝia lando. Tamen, ĉar ŝi ne havis ian logikan argumenton ol tiun de kutimo, ŝi, post pripenso kaj hezitoj, surmetis unu el miaj ĉemizoj. Kelkajn tagojn poste, simila afero okazis pro manko de puraj pantalonetoj. Tiam, hezitoj rapide malaperis. Nun ŝi ridas pri tio, kaj similaĵoj pli kaj pli maloftas. Mi preskaŭ bedaŭras ŝian infanecan kredemon...

Se racio rapide forbalaas tabuojn el ŝia menso, alia tikla sinteno ne rapide forvaporigis: ŝia sinteno al Japanoj. Koreoj malŝatas Japanojn kun fervoro pro la longa okupado de Koreio far la japanaj militistoj. Tamen, lastatempe, Usono fariĝis la plej malŝatata lando, eĉ pli ol Japanio. Plej trafaj kaj logikaj argumentoj ne helpis forigi ŝian malŝaton kaj mi ektimis ŝian unuan viziton al Japanio. Kiel ŝi kondutos kun miaj japanaj konatoj kaj studentoj? Efektive, ĉio ne tuj iris glate kaj ŝia konduto estis defia kaj super-eca en la komenco (kaj tio malgraŭ ŝia hontemo). Pli poste, ŝi jam agnoskis, ke Japaninoj ege afablas kun ŝi, sed ankoraŭ ne sentis emon amikiĝi kun kelkaj el ili. Tamen, iom post iom, la malŝato tute malaperis kaj ŝi ekamikiĝis kun kelkaj Japaninoj kaj eĉ nun korespondas (francalingve) kun unu el ili. Evidente, pro la diferenco de kulturo kaj manko de komuna lingvo, rilatoj inter M-s kaj gejapanoj restas iom surfacaj, sed ankaŭ mi tion spertas ĉiutage.

Malŝato al Japanoj tre profunde enradikiĝis en la mensoj de Koreoj. Tion mi konstatis ĉe Esperantistoj mem. Mi foje aŭdis de junaj Esperantistoj la jenon (aŭ similaĵojn): "Jes, mi ĝojas renkontiĝi kun japanaj samideanoj kaj deziras amikiĝi kun ili," "jes, mi pretas gastigi ilin," (...) "Tamen, en mia koro mi malŝatas Japanojn" !!!

Ĉiujare okazas la fama K.S. (komuna seminario inter Koreoj kaj Japanoj). Tiu evento kaj la multaj karavanoj de junaj koreaj Esperantistoj (ofte balbutantoj) en Japanio iom post iom helpas malaperigi tiun fortan, kvazaŭ malsanan, senton de Koreoj.

Antaŭ unu jaro, M-s ricevis hundidon kiel donacon de sia patro. Ĝi, nun unujara, plu vivas supozeble feliĉa (kvankam ĝi disponas nur je balkono kiel ekstera promenejo) kaj plu ricevas kompareblajn amon kaj flegojn de la tuta familio kiel ĝiaj kuzoj ricevas ekzemple en Anglio aŭ en Francio. Mi eĉ ricevis foton de la ŝatata hundido. Bedaŭrinde, tiu feliĉa tempo post kelkaj monatoj forsvenos. La hundo estos tiam mortigita kaj poste manĝita de la patro kaj liaj amikoj. Koreoj, ĉefe la viroj, ŝatas manĝi hundaĵon somere. Tamen, pli kaj pli da junuloj ne ŝatas tiun tradician manĝaĵon. Por mia naskiĝdatreveno mi manĝis kun junaj Koreoj en restoracio kaj sole elektis hundaĵon, kiu cetere ne bongustis al mi... (\*)

(eble daŭrigota) Mino, 91.03.22

R.A.C.

(\*) Se vi hazarde havas falsajn sciojn pri mortigado kaj manĝado de hundaĵo en Koreio, nepre legu la artikolon de S-o Puramo Chong "Hundon manĝi" en *La Espero* el Koreio, Marto/Aprilo 1990.

\*\*\*\*\*

## PROZA LIRIKAĴO

Mi ne scias, ĉu la kribrilo de Kribo filtros ĉi tiun artikoleon. Estas tiom da gravaj problemoj kaj urĝoj inter la homoj kaj, probable, ne estas konvene plenigi la paĝojn de gazeto per lirikaĵoj.

Sed LAŬTE! aperas en lando, kie floras Amoro, floroj kaj parfumoj.

Kiam mi lernis la francan lingvon, la profesorino ripetadis ĉiupaŝe: "C'est l'Amour" (Amoro kulpas) kaj tre ofte: "Cherchez la femme" (En ĉio grava, kio okazas malantaŭ tio troviĝas virino).

Estas franca ankaŭ ĉi tiu bela kaj trafa proverbo: "L'Amour. Qui que tu sois, voici ton maître: il l'est, le fut ou le doit être" (La Amo - Amoro - . Kiu ajn vi estas, jen via mastro: ĝi estas, ĝi estis aŭ ĝi estos via mastro).

Kaj bazita en tio, jen mia proza lirikaĵo, ĉar mi rakontos al vi epizodon, dolorigan epizodon, kiun mi travivis.

Mi amis virinon, profunde mi amis ŝin. Kaŭze de ŝi mi havis grandan seniluziigon, ĉar kiam mi atendadis la bonon venis al mi la malbono.



Mi ploris, ploregis. Tamen okazis, ke pro cirkonstanco de la vivo mi devis iri al la tombejo por alporti florojn al iuj ajn, kiu tie ripozas. Tamen en tiu momento mi trovis, ke mi estas ploreganta en la tombejo, inter la mortintoj, ne tiun virinon, kiu kuŝas tie, en tombo ĉe miaj piedoj, sed pro virino, kiu estas viva.

Ho, ribelema koro, kiu ne rezignacias maljuniĝi!

A. Lopez Luna

Noto de la redaktanto pri "la kribrilo de Kribo..."

La malnovaj legantoj de L! ja scias, ke la truoj de tiu filtrilo estas tiom vastaj, ke eĉ la plej malspritaĵoj aŭ plumbe pezaj aferoj sukcesas traŝovi sin en L!, foje fuĝigante ne-avertitajn novabonantojn. Al ĉi-lastaj mi do konfesas: la formulo de L! estas efektive la rifuzo al kribrado fare de la redaktanto. Tio ĉi kompreneble ne aplikiĝas al tradukoj, kiujn de la komenco ni asertis malpli bonvenaj ol la sinesprimado de eĉ plej ordinaraj esperantistoj. Mi sufiĉe alte taksas la sagon de la abonantoj por lasi ilin mem selekti laŭ siaj preferoj.

Al amiko Lopez Luna mi dankas, ke lia afabla vortluda provoko donis al mi okazon rememorigi la ĉi-supran, bazan principojn de **Laŭte!**. Respekte al ĉiuj Kribo.

\*\*\*\*\*

La venonta n-ro aperos **komence de septembro**. Se restos sufiĉe da loko post la presado de ĉiuj artikoloj (novaj kaj ĝis nun prokrastitaj), akompanos ĝin la Adresaro de la abonantaro.

### AL LA BROŜUR-ABONANTARO

La Broŝurservo ne projektas eldoni novajn manuskriptojn ĉi-jare. Ni celas prefere reeldoni prilingvajn broŝurojn kaj ĉefe la unuan volumon de **El verkoj de E. Lanti**, kiu arigos la plej fundamentajn tekstojn de SAT, laŭ jena novarangita enhavo: **For la Neŭtralismon!** - **La Laborista Esperantismo** - **Abolutismo** - **Herezulo** - **Herezaĵo** - **Adamaĵoj**.

La nova volumo, 172-paĝa estas prespreta. Antaŭfiksita prezo : 35 FF. Ĉar la eldonkvanto estos nepre limigita, estas bonvenaj la antaŭmendoj. Tiuj ĝuos 20-procentan rabaton.

Kribo

### SENSTEMO

Sentemaj poetoj? (Garolo, Laŭte 92) Mi devas konfesi, ke neniam mi komprenis la logikon de la vorto "sentema". "Inklina al / kapabla je" - grandega diferenco! Mortema mi ne ĉiam estas, mortonta nepre!

Senti mi kapablas pli ol mi inklinas. Ĉar doloras sentoj. Peza ŝarĝo... Hodiaŭ, la 17-an de marto, tagon de la ruĝ-armea referendumo en Sovetio, mi sentas tiom da bezonoj ion verki kiel per poemoj de Ileana Mălăncioiu (en Laŭte 80). Por malfermi fenestrojn, rigardi de alia vidpunkto la mondon. Tiom da: por tiom da nacioj.

Sed hodiaŭ estas ankaŭ la tago de Sankta Patriko - do mi lasos Irlandon paroli nome de ĉiuj.

Releginte miajn notojn pri Irlando en Laŭte 91, mi konsciis, ke necesas pli ol unu Irlandon prezenti - per ekzemplo io el la Nordo :

Ciaran Carson

### REAPERANTO

La maljunulin' anĝela - pulbazar' vendredon matene -  
fingron kaj dikfingron lekas kaj de sur pulovero plukas  
bulojn de lanug', mangladas linan bluzon senfalta, lumo  
tra ĝi brilas al okulo preskaŭ perfekte ĉielblua.  
Pendas virkostum' eksmoda kvazaŭ ŝi mezurus kadavron.

Tian ulon mi renkontis en la Iru-en-la-Mur-drinkejo:  
kudroj krevis en kaduka duamondmilita flugjako,  
brako preskaŭ pendis. Ŝercis "Ĵus Dresdeno, ĉu?" la kelnero.  
Kraĉis l'ul' : "Ne ridu. Mortis mia patr' en fika ĉi jako."

Kaj ankoraŭ io el la irlanda lingvo mem (intence mi elektis du poetojn kiuj lastatempe laŭdis, eĉ tradukis, unu la alian) :



PRI LA LINGVO

Esperon mi lanĉas  
en lingva boat'  
samkiel lulile  
kuŝantan infanon  
en korb' el plektitaj  
iridaj folioj,  
bitumo kaj peĉo  
por ŝmiri la fundon.

Mi lasas ĝin inter  
kareksoj kaj junkoj  
(katvostaj) surborde  
de granda river':  
jen oni ne scias,  
kien portas la fluo,  
jen (Mose'!) en la sinon  
de filin' faraona.

Restas nun prezenti la protestantan Nordon. Ĝis venonta numero!

Finfine (kun amika flugilbato al Garolo) :

"Al pli grandaj poetoj ĉio videbla rilatas la nacian vivon, kaj per tio l'universalan kaj dian vivon; nenio estas izolita arta momento; ekzistas ĉie unueco; ĉio plenumas celon, ne la propran; hajlero mesaĝas por Dio; herbero portas surpinte l'universon. Sed universalisma vidi-unuecon-ĉie atingeblas nur per la proksima, la nacia aŭ, se vi ne vojaĝas, la vilaĝo kaj surmuraj araneretoj. Granda poezio sen nacio, same kiel religio sen simboloj, ne eblas. L'universon oni povas tuŝi nur per mano en ganto - la ganto estas onia nacio, la sola afero kiun oni iomete konas."

- W. B. Yeats, sept. 1888

(Por neniun trompi mi konfesas, ke Yeats (jejc) estis tiam juna novbakita naciisto, ĵus ŝanĝinta rusan princon en poemo de l'pasinta jaro al irlanda. Sed ĉu tio gravas, se la vortoj trafas? Okazas foje, ke ni ne tuj vidas, kiel estas...)

Meva Maron

\*\*\*\*\*

Pli pri "PEKOPENO KAJ BOLDURA"

Post la publikigo de "Legendo pri la bela Pekopeno kaj la bela Boldura" (\*), amiko VALO, kiu tradukis ĝin el la verko de Viktoro HUGO "Le Rhin" (Rejno), sendis la ĉi-postan aldonon kun jena komento : "Mi hezitis, ĉu

(\*) SAT-Broŝurservo, 1988. Ankoraŭ disponebla : 15 FF.

sendi aŭ ne : ĉu tia "vera historio" povas interesi legintojn de la bela legendo?". Mi supozas, ke jes. Kaj eble tiuj, kiuj ankoraŭ ne legis la "Legendon", trovante la ĉi-postan aldonon, emos legi la tutan broŝuron? Kribo

LA VERA HISTORIO DE PEKOPENO KAJ BOLDURA

Sunleviĝo sur Rejno. Tra aĵuro en fenestroklapo, radio milde trafas la vizaĝon de la kavaliro. Li vek-iĝas, malfermas la okulojn, sin flanken turnas. Apud li sur la lito kuŝas bela juna virino.

Ŝi duondorme flustras : Pekopen'... Li respondas : Boldur'...

La nokta ĉaso de la diablo estis nur terursonĝo. La junulo retrovis sian junan fianĉinon, kaj de hieraŭ la geamantoj estas geedzoj. Antaŭ ilia juna paro brilas estonteco de feliĉo.

Unu jaron poste, la naskiĝo de bela bebo ankoraŭ pli feliĉigas ilin. Du jarojn poste venas ĉarma fratineteto, kaj altigas la feliĉon al kulmino. Ŝajne neniun nubeto povus malheligi la serenon de ilia pura ĉielo.

Baldaŭ tamen, en tiu ĝojplena etoso, la ĉasisto estis rekaptita de siaj malnovaj demonoj, de siaj instinktoj aventuremaj. Ne malpli amanto sian Bolduran, li havis plurajn kromamatinajn, sinsekve kaj samtempe.

Boldura estis ĵaluzo, kaj ploris.

Al ŝia koncepto pri fideleco, kiun li nomis negativa ("Neniun virinon krom mi, neniun amon krom la mia") li kontraŭmetis sian propran koncepton pri pozitiva fideleco : "Kvankam mi amas ankaŭ la aliajn, mi restas fidela al mia unua amo". Edukate en tradiciaj moroj, ŝi ne komprenis, kaj suferis.

Ŝiaj larmoj krevis la koron de la amanta edzo. Li rezignaciis al drasta decido : li likvidis siajn aliajn amojn. La ofero estis ege dolora por ili kaj por li. Li firme eltenis, sed li daŭrigis kun ili kaŝan korespondadon.



Iam erardirektita letero hazarde falis en la manojn de la sentema edzino, kaj refrapis ŝian ne cikatriĝintan vundon. Ŝi denove suferis kaj ploris. Pekopeno rezignis ankaŭ pri la korespondado. Ekde tiam, nenio plu ligis lin kun la ekstraj amoj.

Li sin komparis al Peer Gynt\*, kiu, maljuniĝinta, post aventurplenaj jaroj, revenis al sia ĉiam fidela fianĉino Solvejg. Sed la ĉarmo estis rompita. Boldura ne povis forpeli la dolorajn rememorojn, kaj Pekopeno saŭdade memoris pri la forlasitaj amatinoj. La vesto de ilia komuna vivo restis traŝirita de dramaj momentoj.

Ĉirkaŭate de siaj gefiloj, genepoj kaj pranepoj, ili devus fini en plena sereno sian feliĉan ekzistadon. Tamen ilia longa maljuneco malgaje sin trenadas.

- Pekopen', Pekopen'! - Boldur', Boldur', Boldur'!

\* Peer Gynt : ĉefrolulo de fama dramo de Ibsen kun scena muziko de Grieg. (La libro aperis ankaŭ en esperanto.)

## La restadoj en MOULIN DE BEAUVILLE


- julio/aŭgusto 1991 -

- \* de la 8a ĝis la 14a de julio : E-kursoj
- \* de la 29a de julio ĝis la 4a de aŭgusto : La temo estos : Por lerni esperanton praktike utiligeblan (vd. L!93, p.56)
- \* de la 5a ĝis la 12a de aŭgusto : Ĉu vi ŝatas rakontojn?
- \* de la 13a ĝis la 20a de aŭgusto : Libera restado laŭ la kutima formulo. (Vd. L! 92, p.59 kaj 60.)

La interesatoj bonvolu kiel eble plej baldaŭ informi pri la periodo dum kiu ili partoprenos.

Adreso : Esperanto, Cargue Sac, F-47470 BEAUVILLE  
Telefono : 53.95.40.26

Informoj pri la kondiĉoj de restado aperis en **Laŭte!** 92, p.59. Intertempe progresis la loĝebligado de la konstruaĵoj kaj ankoraŭ plibeligiĝis la ĉirkaŭaĵo. Sed estas bonvena ĉies helpo por partopreni en la diversaj, tre multifacetaj, aktivecoj. Amike al ĉiuj, Solanĝa, Ivo, Gastono, Kribo.



## LA JULIA PROGRAMO

en "Moulin de l'Hermeton", Route de Givet, 68  
B-5540 HASTIERE-LAVALUX

\* De la 6-a ĝis la 11-a de julio, kun Giorgia Henningsen okazos semajno pri preparado kaj/aŭ kuirado de **vegetaraj manĝoj** kaj de **pano**. Restos tempo por promenoj, kolekto de ligno kaj plantoj, kaj kompreneble aliaj distraĵoj : kantoj, dancoj, ludoj.

Kurso por komencantoj estos aranĝita.

Pliaj informojn petu de G. Henningsen, Place des Chasseurs Ardennais, 12 B-1040 BRUXELLES Tel.: 02-7353831

\* De la 12-a ĝis la 19-a de julio, Gilles Hutereau kondukos nin al kreado de verko (aŭtobiografia, detektiva, fabela...) per kolektivaj ludoj, ekzercoj kaj laboro. Alterne, kun Katrin', okazos ankaŭ teatraj ludoj kaj surbendigo de rakontoj aŭ scenoj.

\* De la 20-a ĝis la 26-a rekomenciĝos aŭ plu daŭros la verkludoj kun Gilles. Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe : Gilles Hutereau, Rue Hélène Ryckmans 1, B-1080 BRUXELLES  
aŭ : Katrin' Samain, 9 rue E. Branly, F-60200 COMPIEGNE

PREZOJ : Ni dividis la nutrajajn elspezojn inter la partoprenantoj, same kiel la diversajn taskojn (kuirado, purigado...)

ranoktado :	plenkreskuloj	junuloj ĝis 25 jaroj	infanoj ĝis 14 jaroj	beboj ĝis 4 jaroj
ndumado (duŝoj)	125BF	75 BF	50 BF	senpage
gado en dormejo la muelejo	250 BF	130 BF	75 BF	"
gado en la domo plurlita ĉambro	275 BF	/	/	"
gado en la domo plurlita ĉambro	300 BF	/	/	"

## ORGANIZA KONGRES-KOMITATO (O.K.K.)

Prezidanto: Guy VANDERPUTTEN

Sekretarioj: Maggy HERMAN  
Ferdinand SIMON

Kasistino: Clémentine STAQUET  
Rue du Loutrier, 14  
B-1170 BRUXELLES, Belgio

### Poŝtkonto:

numero 000-1495657-14 je la nomo de  
64-a SAT KONGRESO OTTIGNIES-L.L.N.  
c/o STAQUET Clémentine,  
rue du Loutrier, 14,  
B-1170 BRUXELLES, Belgique  
Konstanta adreso: tiu de la kasistino.

OTTIGNIES L.L.N. estas universitata urbeto 20 km-ojn de  
de Bruselo. Ni loĝos en universitataj lokoj.

- 1) - Ĉiu kunportu sian tualetmaterialon: tualetujojn, sapon, dentobrosan, bankostumon ktp.
- 2) - Sportoj praktikeblaj kun fake kompetentaj monitoroj: naĝado, teniso, retpilkado, marŝado kaj korbopilko.
- 3) - Por la hoteloj, la prezoj estas ege altaj. Ni donos la informojn al tiuj, kiuj tion speciale petos.
- 4) - Bankoj kaj poŝtoficejo ne funkcios nek sabaton, nek dimanĉon.
- 5) - La akceptejo estos malfermita sabate ekde la 14-a horo.
- 6) - Oni loĝos en du lokoj: a) universitato kie estas unuilataj ĉambroj; b) sporta centro kun plurilataj ĉambroj.

a) - la prezo de plena pensio en unuilata ĉambro kun lavujo (universitato) por tuta semajno kaj po persono estas: 11.350 B. Fr.

b) - la prezo de plena pensio en plurilata ĉambro kun lavujo (en sporta centro) por tuta semajno kaj po persono estas: 7.500 B. Fr.

Ambaŭ prezoj inkludas tranoktadon, tri manĝojn kaj sportajn eblecojn por tuta semajno.

Ni atentigas vin ke tiuj prezoj ne estas divideblaj. Ne eblas pagi por parto de la semajno (krom tiuj kiu loĝos en hoteloj).

### EKSKURSOJ:

Ni havos du duontagajn ekskursojn kaj unu tuttagan:

- a) duontaga ekskurso al Planckendael kiu estas belega bestparko en la flandra parto de Belgio.
- b) - dua duontaga ekskurso gvidos nin al Beloeil, granda parko en kiu ni vidos trajneton, "Mini Belgion" kaj kastelon.
- c) - Tuttaga ekskurso gvidos nin viziti Lessive, telekomunikacian centron TT-Belgio. Krome ni vizitos flor kaj akvogardenon - Annevoie.

64-a KONGRESO DE S.A.T.  
BRUSELO-OTTIGNIES-L.L.N.  
27.07.1991 - 02.08.1991

<b>KONGRESKOTIZOJ</b>	
en B.F.	
SAT-membro	2100
SAT-geedzoj	2800
SAT-gejunuloj	950
Gastio	2600
Gast-geedzoj	3200
Gast-gejunuloj	1100